

# LA ONDO de Esperanto

*Internacia sendependa magazino en Esperanto*



Decembro  
2008

№12

# LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2008. №12 (170)

**Aperas** ĉiumonate

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov

**Refondita** en 1991

**Eldonas kaj administras** Halina Gorecka

**Redaktas** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj** Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

**Adreso** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Telefono** (4012) 656033

**Elektronika poŝto** sezonoj@kanet.ru

**Hejmpaĝo** <http://Esperanto.Org/Ondo>

**Abontarifo por 2009**

*Internacia tarifo:* 38 eŭroj

*Orienteŭropa tarifo:* 20 eŭroj

*Ruslanda tarifo:* 450 rubloj

*Pollanda tarifo:* 60 zlotoj

*Aerpoŝta aldono:* 5 eŭroj

*Elektronika abono (pdf):* 12 eŭroj por ĉiuj landoj

**Perantoj** vidu la liston sur la 27a paĝo.

**Konto ĉe UEA** avko-u

**Recenzoj** Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

**Eldonkvanto** 650 ekzempleroj

**Anonctarifo**

*Plena paĝo:* 100 EUR (2000 rubloj)

*Duona paĝo:* 60 EUR (1200 rubloj)

*Kvarona paĝo:* 35 EUR (700 rubloj)

*Okona paĝo:* 20 EUR (400 rubloj)

*Malpligrandaj:* 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm<sup>2</sup>

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

**Donacoj** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto "avko-u" ĉe UEA.

**Represoj** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2008.

"La Ondo de Esperanto" (Волна эсперанто). 2008, №12 (170).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 17 ноября 2008 г.

Цена свободная. Тираж: 650 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

## Vortoj de Komitatano Z.

### Akademiozo

Ne mankas al ni akademioj. Ekde la ĉi-jara UK estas almenaŭ kvar tiaj, ĉar Esperantlingva Verkista Asocio transformiĝis al Akademio Literatura de Esperanto (ALE). Nun preskaŭ ĉiuj iom aktivaj verkistoj nialingvaj estas akademi-anoj. Tiurilate aliaj lingvoj ne povas konkurenci kun Esperanto, sed kun la nivelo de nia literaturo tiu sinpromocio ne havas ligon.

La akademiecon de Akademio de Esperanto la esperantistoj certe agnoskas. Oni ne dubas pri ĝia legitimeco, ĉar ĝi estis proponita de Zamenhof kaj fondita kvazaŭ per kolektiva decido de la kongreso en Bulonjo. Ankaŭ ALE estis fondita dum UK sed sen ties aŭtoritato, ĉar ĝi naskiĝis en la faka kunsido de EVA kaj ŝajne ne ricevis atenton en la oficiala programo, kie publika aplaŭdo al anonco pri ĝia fondo estus povinta doni popolan benon al ĝi. Denaskan prestiĝon donus ankaŭ, se ALE estus iniciatita de instanco, kiu mem havas prestiĝon. Plej nature tiu estus Akademio de Esperanto, sed ĝi mem havas Literaturan Sekcion kaj ne povis senti bezonon pri io nova kaj aparta. Ĉar ALE ne ricevis aŭreolon de akademieco kiel doton ĉe sia fondo, ĝi devos klopodi akiri ĝin en la praktiko.

Dum 25 jaroj EVA ne sukcesis certigi konstantan aktivecon. Tiu sperto devus malkuraĝigi ĝian promocion akademio, sed la optimisma prezidanto Mauro Nervi verŝajne vidis ŝancojn, kiuj al aliaj ne estas evidentaj. Laŭ la raporto ankaŭ en EVA ne regis entuziasmo por fondi ALE, kio ŝajnas esti propra ideo de Nervi. Mi ne scias, kiom longe la plano estis kovata, sed impreson pri hasto oni ja ricevas. Eĉ pri la nomo regas konfuzo: laŭ la statuto ĝi estas Literatura Akademio de Esperanto, sed ĝia retejo uzas tiun, el kiu devenas la mallongigo. Pri tiel elementa afero seriozaj akademianoj devus esti pli striktaj!

Nia historio plenas de iniciatoj, kiuj disfloris, ĝis mortis la protagonisto aŭ estingiĝis ties propra entuziasmo. En la Jarlibro de UEA plu fantomas Scienca Akademio Comenius. Ĝi estis fondita en 1983, sed baldaŭ oni ĉesis aŭdi pri ĝi, ĉar mortis Paul Neergaard, kies ideo ĝi estis. Ĝi estis serioza akademio en tiu senco, ke en ĝi plimulto devis esti membroj de naciaj akademioj, sed ĝi ne transvivis la iniciatinton, ĉar mankis natura bezono de tia institucio. Samjare fondiĝis ankaŭ Akademio Internacia de la Sciencoj, kiu fariĝis multe pli sukcesa kaj arigis mirindan kvanton da scienculoj, kvankam plimulto membris nur formale sen partopreni en la agado. Nun AIS agonias, ĉar malsaniĝis ĝia patro kaj motoro Helmar Frank. Lia energio estis fenomeno, sed ĉe li realismo cedis tro multe al entuziasmo. Anstataŭ starti modeste kaj lasi la aferon kreski laŭgrade, li starigis dekomence tiel pezan strukturon, ke tutmonde dissemita libervolularo ne povis ĝin vivteni. Troigita ekstera pompeco krome subfosis ĝian seriozecon ĉe sobraj observantoj, ĉar la malkongruo kun la realo estis tro kria.

Ĉar ni nun havas literaturan akademion, ni deziru al ĝi sukceson por pruvi sian utilon kaj eble eĉ neceson. Pesimismon oni pardonu, ĉar ĝin trudas la sperto pri EVA kaj pri la Literatura Sekcio de la lingva Akademio, kiu jam vane serĉis por si niĉon.

**Komitatano Z**

Lige kun la Tago de la Libro, literaturo estas la temo ne nur de Komitatano Z, sed de la tuta kajero, sur kies kovrilo estas la ĉina Esperanto-poeto Mao Zifu.



# Ĉu legokrizo (ankaŭ) en Esperantujo?

La *Ondo* jam okazigis “Rondajn Tablojn” pri la Esperanto-gazetaro, pri libroeldonado, pri la (mal)sukcesoj de la jaro 2007 kaj pri la centjariĝo de UEA. La kvinan temon sugestis la artikolo de Paulo Sérgio Viana *Kial esperantistoj preskaŭ ne aĉetas librojn?* en la novembra “Ondo”. Ni proponis al kelkaj verkistoj, eldonistoj, redaktoroj, librovendistoj kaj legantoj respondi la tri subajn demandojn:

1. Ĉu nuntempe oni efektive aĉetas/legas malpli da Esperanto-libroj ol antaŭe?
  2. Ĉu la (supozata) mallegemo/malaĉetemo en Esperantujo havas specifajn kialojn kompare kun la “Granda mondo”?
  3. Ĉu la situacio en nia libromarkato estas plibonigebla? Se jes, kiel?
- La ricevitaĵojn respondojn ni publikigas en decembro — ja ĝuste en decembro okazas la Tago de la Esperanta Libro.



**Humphrey Tonkin**  
**Usono**

## **Eksprezidanto de UEA**

1. Kompare kun, ni diru, antaŭ tri-dek jaroj, verŝajne aperas pli da titoloj nuntempe. Pensu nur pri romanoj. Antaŭ kvardek jaroj ekzistis entute nur manpleno da romanoj en Esperanto. Nun la nombro plenigus almenaŭ du brakojn. Mankas, tamen, sento de librokulturo en Esperanto. En la epoko de *Literatura Mondo*, kaj poste la epoko de *Norda Prismo* kaj *Nica Literatura Revuo* — kaj eĉ la epoko de la unuaj numeroj de *Literatura Foiro* — oni kvazaŭ sekvis la karierojn de la verkistoj en Esperanto, kiuj rolis kiel publikaj figuroj. Tiu kerno de ĝenerale rekonataj verkoj kaj verkistoj mankas nuntempe: oni ne povas certi, ke kulturita esperantisto legis sian porcion de la poemoj de Kalocsay aŭ Auld, aŭ la noveloj de Francis. Kiel iam diris Oksforda profesoro pri iom simila problemo, “Tiam ekzistis literaturo; nuntempe estas nur libroj”. Tamen ekzistas kelkaj lumaj punktoj en la hodiaŭa ĉielo: la naskiĝo de *Beletra Almanako*, kiu eble iam ludos rolon similan al tiu de la menciitaj revuoj; iom pli konscia aliro al la Belartaj Konkursoj de UEA; la fondo de Akademio Literatura de Esperanto kiel posteulo de la iama EVA.

2. Mi konsentas kun tiuj, kiuj montras al la absolute primitiva organizado de la Esperanta libromarkato. Laŭ mia sperto, nur la eldonejo *Mondial* sisteme utiligas la rimedojn de Amazon kaj similaj retaj amasvendejoj. Kaj eĉ nia ĉefa libro-servo (tiu de UEA) apenaŭ utiligas la normalajn modernajn praktikojn de librovendado. Estas apenaŭ kredeble, ekzemple, ke UEA pagigas de la aĉetantoj aldonan procentaĵon pro tio, ke ili utiligas kreditkartojn...

3. Reliefigi la literaturon pli klare en nia gazetaro kaj aliaj komunikmedioj; publikigi tie rekomendojn pri legindaj verkoj kaj bonajn recenzojn; krei vizitindajn retejojn al kiuj oni povas sin turni por frandi la E-literaturon kaj ekkoni la ĉefajn verkistojn; uzi la Universalajn Kongresojn kiel montrofenestrojn de nia literaturo; aperigi antologiojn, simplajn legaĵojn, seriojn de klasikaj verkoj — kaj ilin vendi efike; pli sisteme klopodi eldoni verkojn interesajn al la mezaj esperantistoj. Mallonge: ĉion fari por krei librokulturon en nia Esperanto-komunumo. Jes, belus plialtigi la lingvan nivelon de la esperantistoj por ke ili pli avide legu — sed same belus legigi la esperantistojn por ke ili plibonigu sian lingvan nivelon...

La 15a de decembro estas La Tago de la Esperanta Libro. Laŭ la *Enciklopedio de Esperanto* “oni konsideras morala devo de ĉiu vera E-isto okaze de tiu ĉi tago aĉeti minimume unu E libron”. Ĉu vi estas vera Esperantisto?

**Tomasz Chmielik**  
**Pollando**

## **Eldonejo Libro-Mondo**

1. Mi opinias, ke oni aĉetas same multe da libroj kiel en la pasintaj jaroj. La nombro da legantoj iom malkreskas, sed tuj aperas novuloj, kiuj ekvilibras ĉi perdon. La merkato restas sama. Mi taksas, ke la kvanto da esperantistoj, kiuj reale partoprenas la kulturen Esperanto-vivon, oscilas ĉirkaŭ tricent, do oni povas facile kalkuli, por kiom da homoj ni verkas, tradukas kaj eldonas librojn. Tio ne ŝanĝiĝas de jaroj. Imagu, ke dum la UK-oj, kiuj estas plej grandaj aranĝoj esperantistaj, ĉiujare la rekordoj de vendado de la plej furoraj titoloj estas inter 20 kaj 30. Tio vere estas hontiga rezulto kun 1800 ĝis 2500 kongresanoj averaĝe.

2. Mi pensas, ke esperantistoj, precipe tiuj, kiuj eniras la movadan vivon, bezonas klerigon. Mi sidis dum la roterdama UK kaj observis homojn enirantajn tien, kie troviĝis la libro-servo. Estas du grupoj. Iuj venas kaj tuj elektas la titolojn, kiujn ili trovas en amasego da ofertataj varoj. Aliaj aperas, prenas kelkajn librojn, vidas neniondirajn aŭtorajn nomojn, titolojn, malkapablas loki tiun aŭ tiun verkon en literatura epoko kaj eliras, kaj mi certas, ke ili neniam plu revenos. Ili estas perditaj. Do, ankoraŭfoje mi ripetas klerigon, kaj ankoraŭfoje klerigon.

3. Seriozajn recenzojn, rondojn de libro-ŝatantoj en Esperanto-klubo diverslande, pli oftajn renkontiĝojn kun aŭtoroj — jen tion ni bezonas. Tiajn problemojn ni ne spertas en naci-lingvaj literaturoj, kie la oferto pli riĉas kaj la ebleco aliri al dezirataj aŭ malkovrataj libroj pli varias kaj pli allogas. Ni bezonas esplorojn pri nia libromarkato, ke ni povu ekkoni ŝatojn kaj malŝatojn de legantoj. Eble estus inde pripensi komunan serion da esperantaj klasikaĵoj, kiuj laŭ unueca aspekto, kun valora scienceca enkonduko pri la koncernaj aŭtoroj kaj verko povus esti publikigataj ne tro multekoste laŭ kunlaboro de diversaj Esperanto-eldonejoj.

Malkovrinda estas la tuta mondo de sonlibroj, kiuj ne oftas en Esperantujo, kaj tiuj, kiuj haveblas, elrevigas legantojn per avarega reĝisorado sona kaj muzika, kaj malinstigas al aĉeto pro enuigaj voĉoj de lektoroj, kiuj ankaŭ ne malofte sonas fuŝe laŭ prononco.

Mi konscias, ke estas malfacile antaŭvidi kaj lanĉi titolon, kiu furoros. Mi inkliniĝas al la opinio, ke inter Esperanto-eldonaĵoj devus tamen esti plej diversspecaj verkoj, kiuj kontentigos ĉies preferojn.

Gravas ankaŭ la prezo, de kiu dependas aĉetemo. Sed mi opinias, ke pli-malpli la eldonkostoj ekvilibriĝis. Ĉu tamen ne interese estus fondi klubojn de legantoj, en kiuj laŭ sistemo de favorpreza abono la membroj povus ricevi novaĵojn. Tio multe helpus planadon de eldona politiko ĉiulande.



Madeleine de Zilah

Francio

*La Gazeto*

1. Laŭ mi, ne. Sed mia vidpunkto estas limigita: la libro-servo de *La Gazeto* estas modesta, la “klientaro” ne granda; ĉu eble pli elita, pli legema, pli avida je kulturo, ol la averaĝa esperantisto. Ekzemple, dum la ĉi-jara konferenco de OSIEK, la averaĝa nombro da aĉetitaj libroj estis 4 por unu partoprenanto. Krome, mirigas min, kiom da esperantistoj mendas rete aŭ poŝte, sen vidi la libro(j)n.

2. La “Granda Mondo” certe aĉetas kaj legas malpli ol la E-mondo. Mi vidis E-bibliotekojn imponajn ĉe laboristoj, aŭ ĉe mezaj oficistoj, funkciuloj, kiajn mi neniam vidus en nacia literaturo ĉe similaj ne-esperantistaj homoj. Simple, la kultura sento, la scivolemo, estas pli grandaj en Esperantujo, ol en la “Granda Mondo”. Almenaŭ en la eta E-mondo, kiun mi konas. Vi scias, ke ni vivas kiel ermitoj sur nia barko.

3. Paroli pri libromarkato, pli precize pri **merkato**, aŭ pri komerco, en nia E-mondo, ŝajnas al mi ne digne. Nia celo, almenaŭ mia, tute ne similas al tiu de la **libromondo** (eldono, vendo ktp). Konvinki homon, ke la plej granda riĉigo estas legado de bona libro; konscii, ke la plej granda kreaĵo de homo estas verkado de libro; jen, kio gravas; tio grandparte dependas de edukado.

En la (universitata) urbo, kie ni loĝis kiam ni estis sur grundo, malaperis tri librovendejoj dum la pasintaj 12 jaroj. Restas tri. Posedanto de unu el la tri kulpigas la reton kaj la supraĵajn konojn trovitajn en ĝi. Mi ne konsentas: ni trovas elstarajn informojn, sciigojn, eseetojn pri raraj temoj, kiuj, libroforme, utilis al tre malmulte da homoj, do tiaj libroj ne vendiĝus. Ni trovas librotitolojn elstarajn, lige kun niaj studoj ktp ktp.

Pri Esperanto gravegas, kiel Piĉ skribis oftege, ke ĉiu libro estu konata, ke abundu informetoj pri novaj libroj, eĉ se malfacile estas trovi bonvolemlulojn kaj spacon en revuoj por recenzoj.



István Ertl

Luksemburgio

Tradukisto

1. Laŭ mi, ne — aŭ se jes, tiam ne signife malpli. Ĉiuokaze, oni ne forgesu ke hodiaŭ ekzistas multe pli da manieroj por konsumi — kaj por krei! — Esperantan kulturon ol ekzistis antaŭ 50 jaroj, aŭ eĉ nur antaŭ 10 jaroj. Sekve, malplia librolega tempo kaj malpliaj elspezoj por libroj iusence kompensigas per aliaj kulturaj tempopasigoj.

2. Averaĝa Esperanto-parolanto malpli facile kaj malpli spontane legas en sia lingvo ol averaĝa parolanto de etna lingvo. Esperantisto, eĉ se librema, ne povas havi la iluzion konstrui reprezentivan mondliteraturan bibliotekon nur en Esperanto. Aliflanke, en Esperantujo supozeble pli altas la proporcio de tiuj kiuj aĉetas libron pro ia solidara devosento ol ĉe anoj de etnaj lingvoj.

3. Unuavice per la plibonigo de la distribua reto. Malgraŭ la plikajpliaj prezentaj ebloj de Interreto, homoj ankoraŭ bezonas tuŝi kaj foliumi libron por konvinkiĝi pri ties aĉetado.



Jorma Ahomäki

Finnlando

Leganto

1. Kiel evoluis literatura kampo el vidpunkto de ordinara legemulo sur loka nivelo dum la pasintaj kvin jardekoj, pri kiuj mi havas iujn spertojn? Estas malfacile diri ion ĝenerale validan. Antaŭ kelkaj jardekoj oni prezentis librorecenzojn eĉ en klubaj kunvenoj kaj en societaj bultenoj. Nun regas sur tiu ĉi tereno preskaŭ plena silento. Nur iuj unuopuloj ĉi-rilate aktivas. Iom simpligite oni povas konkludi jene: niaj antaŭuloj estis pli favoraj ol nuntempuloj por legi kaj aĉeti literaturajn verkojn. Tamen la hodiaŭaj eblecoj lige kun relative alta vivnivelo donas por la problemo pozitivajn aŭgurojn estontece.

2. Esperantistoj vivas dise en la mondo. Tiu fakto rakontas pri malfacilaĵoj sur libro-merkato. Nia internacia gazetaro kontentige raportas pri freŝaj eldonaĵoj, sed nur hejmlande oni tuj vidas kaj povas propramane foliumi novajn nacilingvajn verkojn. Modele funkcias la Libroservo de UEA. Lunde matene mi telefonas mian mendon al Roterdamo kaj jam merkrede alvenas per aerpoŝto tra hejmaletertruo la pakaĵo. Kompreneble tuj eblas komenci avidan legadon. Oni povus publikigi sur paĝoj de niaj periodaĵoj pli da etaj informoj kelkliniaj pri nova, ĵus aperinta literaturo.

3. “Esperanto estas tiel bona lingvo, ke ĝi meritas esti parolata, sed ne balbutata” — substrekas Boris Kolker en sia *Vojaĝo en Esperanto-lando*. Jen unu el solvoj por plibonigi la nunan, iel tre tristan situacion inter literaturamantoj. La afero ne estas facila, sed ni ekagu por atingi kreskantan nombron de legantoj kaj aĉetantoj, kiuj kuraĝe retumos al eldonejoj kaj libro-servoj siajn plioftajn mendojn. Jen malnova finna biblioteka slogano: “Legu pli — tiam vi supozos malpli”.

**Aĉetante Esperanto-librojn  
vi subtenas nian junan literaturon**

Serge Sire bildkomentas la temon.





**Mao Zifu**  
Ĉinio  
Poeto

1. Sendube jes.
2. Certe. Nuntempe ne troviĝas tiu fako aŭ profesio de esperanto kiu povas vaste doni al oni panon. Lernante esperanton nur por distriĝi esperantistoj ne bezonas legi tiujn klasikajn librojn tradukitajn el naciaj lingvoj kiujn eldonistoj ŝatas senlace kaj senĉese publikigi. La klasikaĵojn ni konis kaj legis post kiam ni ellernis la literojn. En la merkato mankas verkoj legindaj originale en esperanto mem. Oni devas pruvi esperanton ĉiopova en kreado de novoj sed ne nur en renovigo de oldoj.

3. Unue, eldoni pli da originalaj verkoj, nepre ne ĉiam tradukojn el klasikaĵoj. Due, instigi verkistojn honorarie eble plibonigus la situacion. En la E-merkato mankas originalaj verkoj allogaj, ĉar verkistoj ne havas entuziasmon verkante senpage.



**Maria Sandelin**  
Svedio  
Blogposedantino

1. Tion mi ne scias, sed supozeble tiel estas, ĉar temas pri internacia tendenco.
2. Nu jes. Esperantlingvaj libroj konkuras kun neesperantlingvaj laŭ malegalecaj kondiĉoj pri la atento de legantoj kaj aĉetantoj.

legantoj kaj aĉetantoj. Kompare kun libroj eldonitaj en aliaj lingvoj, esperantlingvaj libroj ofte estas pli amatorece faritaj, kaj kiam temas pri la kvalito de la enhavo kaj pri la ekstero de la libroj. Krome mankas tiu kutima subteno de la ĉirkaŭa socio forme de la edukistoj, bibliotekoj, librovendejoj kaj efika surmerkato. Aliflanke kiel kontraŭpezo al tiuj ĉi faktoroj ekzistas sento de lojaleco kaj identiĝo (al konatoj, al la movado, al la fenomeno Esperanto ktp.) kiu certe foje igas homojn aĉeti librojn en Esperanto kiujn ili cetere ne aĉetus.

3. Jes, oni povus pli atenti kion eldoni kaj kiel, atentante samtempe la merkaton kaj la propran integrecon, same kiel faras kvalitaj eldonejoj en aliaj lingvoj. Ekzemple, kiam temas pri beletraj tradukoj en Esperanto, oni ofte elektas klasikaĵojn, jam ekzistantajn en brilaj tradukoj nacilingve, pro kio la motivo de esperantlingva legado ŝajnas malforta. Mi multe pli volonte vidus tradukojn de nova, ankoraŭ malmulte konata kaj tradukata literaturo. Tiel Esperanto povus funkcii kiel vera literatura ponto. Mi tamen komprenas, ke en la praktiko ekzistas problemoj rilataj al tio kiu pretas traduki kion k. s. Ĉi-lasta do estas respondo ankaŭ al la punkto 2.



**Mine Yositaka**  
Japanio  
Japania Esperanta Librokooperativo

1. Jes. En Japanio esperantistoj emas aĉeti malpli ol antaŭe pro maljuniĝo.
2. Ne. Ekstere, ne tiom en Esperantio, sed oni emas legi pli leĝerajn kaj pli praktikajn.
3. Niaj legantoj preferas aĉeti kaj legi librojn kun pligrandaj literoj, kaj ni klopodas kontentigi ilin. Cetere, nia libroservo dissendas retleterojn de novaj libroj, kaj tio iomete vekas aĉetemon de niaj membroj.

3. Niaj legantoj preferas aĉeti kaj legi librojn kun pligrandaj literoj, kaj ni klopodas kontentigi ilin. Cetere, nia libroservo dissendas retleterojn de novaj libroj, kaj tio iomete vekas aĉetemon de niaj membroj.

**Perla Martinelli**  
Italio

### Prezidanto de la Esperanta PEN-Centro

1. Vi kunmetas du malsimilajn temojn, necesas ilin disigi por iom pli klare fokusigi la situacion. Ja legi kaj aĉeti ne samas, tion jam diris — kun milda amareco — eĉ Zamenhof, parolante pri gazetabonoj komence de nia historio. Laŭ mia sufiĉe longa sperto, mi dirus ke la legemo de la esperantistoj ne estas nun averaĝe pli malforta ol antaŭe, ankaŭ ĉar nia kulturo ne proponas televidon kaj preskaŭ ne kinon. Sed veraj legantoj, kiujn fascinas la magio mergiĝi en artan mondon fantastan, sen alia kialo ol la propra plezuro, neniam estis legioj: ili plu ne estas.

2. La esperanta libromarketo suferas pro du handikapoj: la kosto (ne nur pro la efektiva prezo de la libro, produktata etkvante, sed ankaŭ pro la poŝta afranko) kaj, lige kun la unua, la distribua sistemo. Konkreta fakto estas la malfacilo aĉeti librojn en nia lingvo, ankaŭ ĉar ilin oni ne povas normale trovi en librovendejoj. Jes, oni povas aĉeti laŭ la libroservaj katalogoj, kaj nun ankaŭ rete, sed ĉu tio vere stimulas? Oni enamiĝas al libro ne nur pro ĝia titolo aŭ supozata enhavo, sed ankaŭ pro la prezento, la papero, la litertipoj...

3. LF-koop, kiu siatempe iniciatis la produktadon de kasedoj funkciantaj iom kiel legitaj libroj — la *Esperanta Songazeto* — nun lanĉis per *La Infana Raso* deklamita de William Auld la esperantan ekvivalenton de la KD-libroj jam disvastiĝintaj ĉe la ne-esperantista publiko. Jen moderna vojo certe sekvida. Rilate al la normala produktado, mi opinias, ke niaj eldonejoj faras ĝenerale bonan laboron kaj produktas interesajn librojn, indajn je legado. Sed oni ne sufiĉe ilin reklamas, kaj mankas kontentiga distribua reto. Precipe la distribua sistemo ŝajnas pli kaj pli en krizo: la libroservoj malmultiĝas, la rabatsistemo ne taŭgas, pli kaj pli evidentiĝas stranga situacio: kiu ajn rajtas eldoni kion ajn, sed poste la merkato funelas al unu granda libroservo en Roterdamo, tiel ke praktike ekzistas monopolo en la distribuado. Kaj tio malfavoras sanan konkurencon, do malstimulas la iniciatemon de minoraj libroservoj, malprofite al la legemuloj.

## La reta furorlisto de UEA

Audrey Childs-Mee. <i>Saluton!</i> . . . . .	26 ekzempleroj
Insigno: Esperanta flago . . . . .	20
Stano Marček. <i>L'Espéranto par la méthode directe</i> . . . . .	19
<i>Pasporta Servo</i> . . . . .	15
Glustelo por aŭto . . . . .	12
Stano Marček. <i>Esperanto by direct method</i> . . . . .	10
Claude Piron. <i>Gerda malaperis!</i> . . . . .	10
Claude Piron. <i>Lasu min paroli plu!</i> . . . . .	10
<i>Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA</i> . . . . .	9
Wim Jansen. <i>Naturaj vortordoj en Esperanto</i> . . . . .	9
Bertilo Wennergren. <i>Plena manlibro de Esperanta gramatiko</i> . . . . .	9
K. Kalocsay, G. Waringhien, R. Bernard. <i>Parnasa Gvidlibro</i> . . . . .	8
Jules Verne. <i>Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj</i> . . . . .	7
Humphrey Tonkin. <i>Tuj apude</i> . . . . .	7
Ulrich Lins. <i>Utila Estas Aliĝo</i> . . . . .	7

En la supra listo estas plej grandkvante rete mendataj titoloj dum la pasintaj tri monatoj, la stato je 12 nov 2008. Menciindas, ke (krom la du verkoj de Piron, kiuj estas pli didaktikaj ol beletraj) en la listo estas nur unu beletraĵo — la aventura romano *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj* de Jules Verne, eldonita de *Sezonoj* en septembro 2008.





**Gersi Bays**  
**Brazilo**  
**Eldonejo *Fonto***

1. EfektivEGe! Ĉiam malpli! Ĉe mi la problemoj estas la internaciaj poŝtaj kostoj.

2. Certe gravega problemoj en la esperantista merkato estas la sendokostoj. Unuopan libron ne eblas vendi internacie... la sendokosto estas pli

alta ol la kosto de la libro! Ankaŭ mendoj de libroservoj estas ĉiam malpli grandaj, kaj tio malebligas la vendadon. Ankaŭ ene de la lando la kostoj malfaciligas la vendadon. Tiu diabla “globalizado”(??), kvazaŭ brazilano, ĉino ktp gajnas kiel EU-ano!!!

3. Mi ne vidas solvon.



**Ulrich Becker**  
**Usono**  
**Eldonejo *Mondial***

1. Mi dubas pri tio. La ĝustan respondon povus doni nur libroservoj aŭ eldonejoj kiuj ekzistas/-is dum pluraj jardekoj. Verŝajne la libroservo de UEA povus doni interesajn statistikojn tiurilate, por ke oni povu vidi tendencojn. Mia eldonejo havis rekordan

jaron en 2008 (ĝis nun, meze de novembro) vendinte 1047 librojn. Eĉ se oni subtrahas la du numerojn de la libroforma *Beletra Almanako* en 2008, restas vendoj de pli ol 600 unuopaj libroj, inter ili 234 libroj venditaj tra ekstermovadaj vendokanaloj (lokaj librovendejoj, retvendejoj kiel amazon.com ktp.) Ĉu tio estas malmulte? Certe, kompare kun nacilingvaj librostatistikoj. Sed oni ne forgesu, ke la kerno de aktivaj esperantistoj konsistas el nur kelkaj dekmiloj da homoj. La plej granda parto de niaj “miliojn” estas eternaj komencantoj aŭ balbutantoj.

2. Krom la E-lingvonivelo — ne. La kialoj por nelegado estas ĉie la samaj, en kaj ekster Esperantio: neintereso pri libroj, manko de mono, manko de edukado, manko de komunikado pri legitaj libroj (lego-kluboj), manko de instigo al librolegado. La financa faktoro estas eble la sola faktoro kiu ludas eĉ pli gravan rolon en Esperantio ol ekster ĝi: Esperanto-libroj devas esti sendataj defore, en la plej multaj kazoj, kaj tio multe kostas, aldone al la librokostoj. Nur malofte eblas simple iri al librovendejo ĉirkaŭ la angulo, trafoliumi kaj aĉeti Esperanto-libron.

3. Ĉio ĉiam estas plibonigebla. En Esperantio ĉefe jenaj faktoroj:

— La kvalito de multaj libroj (kvalito de la enhavo, kvalito de la ekstera aspekto kaj de la presado).

— La haveblo de esperantlingvaj libroj en ekstermovadaj kanaloj; por tio eldonantoj partoprenu en la internacia ISBN-sistemo kaj donu en siaj retpaĝoj la ISBN-numerojn kun la titoloj. Tiel iu ajn en Usono facile povas aĉeti libron el Japanio, kaj inverse.

— La Esperanto-instruistaro komprenigu al siaj lernantoj ke la daŭra lego de libroj necesas al la evoluo de la lingvokono, en la kazo de Esperanto eĉ pli ol ĉe naciaj lingvoj: pro la malofteco de buŝa komunikado en Esperantio, la meminstruo de esperantistoj devas okazi pli per presita materialo ol tio okazas en naciaj lingvoj; la nelego estas unu el la kialoj por la

armeo de eternaj komencantoj, kaj niaj instruistoj devas atentigi pri tio kaj instigi siajn lernantojn al kontinua legado post la fino de la kurso.

— Necesas iu reto de interŝanĝo de libroj; la Esperanto-libromerkatoj estas dividitaj kaj ne sufiĉe interagas. Mi ne havas pretan ideon, sed pro financaj kialoj libroj el unu parto de la mondo ne atingas la aliajn angulojn (krom tra la libroservo de UEA). Estus tre bone se iu kreus retan vendejon de uzitaj libroj (laŭ la sistemo de amazon), kie homoj povas revendi siajn librojn kontraŭ multe pli malalta prezo, tiel helpante legontojn en pli malriĉaj landoj.

— Laste: La kulturo de recenzado en Esperantio estas katastrofa. Tri kvaronoj de la librorecenzoj, kiujn mi legas, estas stultaj. Redaktoroj pli bone atentigu ke ili uzu la servojn de kompetentuloj. La unua, plej grava eraro de redaktoroj estas ke ili pensas ke ilia “genia” regula recenzanto povas revendi ĉiun ajn libron. Tio estas garantio por fuŝo, sed ne redakta laboro. Oni ĉiam serĉu laŭeble specialiston en la fakoj aŭ temoj de la libro. Nuntempe multaj revuoj pli-malpli misgvidas siajn legantojn pri la kvalito de libroj kaj misedukas ilin.




**Paul Peeraerts**  
**Belgio**  
**Flandra Esperanto-Ligo**

1. Mi ne havas tiun impreson. Unu el la unuaj libroj eldonitaj de FEL estis *Ĉu rakonti novele?* de Claude Piron. Ni vendis de ĝi 1000 ekzemplerojn. Unu el la lastaj estis *La ŝtona urbo*, ni vendis de ĝi 1200 ekzemplerojn. Se la enhavo estas bona, libroj ja bone vendiĝas, eĉ en nia malgranda merkato.

2. Mallegemo ne; malaĉetemo eble jes. La granda plimulto de la Esperanto-libroj estas vendata perpoŝte. Altiĝas la afrankokostoj kaj forte reduktiĝis la fidindeco de la diversaj poŝtoservoj. Pli kaj pli la legemuloj nur notas titolojn de verkoj, kiujn ili juĝas interesaj, kaj esperas iam dum iu renkontiĝo aĉeti ilin senafranke kaj senriske.

3. Mi havas la impreson, ke la merkato riskas iĝi supersaturita. Aperas jen kaj jen iu furorlibro, sed aperas bedaŭrinde ankaŭ multaj apenaŭ vendeblaj verkoj, kiujn libroservistoj tamen vole-nevole aĉetas kaj stokas, sed kiuj ne alte levas la Esperanto-kulturon, nek prosperigas la ekonomian farton de tiuj libroservoj. Eldonistoj devus pli forte kribri, kaj riski diri “ne” al tro entuziasmaj, sed ankoraŭ tro malmaturaj verkistoj. Ankaŭ mi kelkfoje falis en tiun kaptilon!



## EEU por aktiva civitaneco

3 okt 2008 en Bruselo Seán Ó Riain kaj Maja Tišljár kiel reprezentantoj de la Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) partoprenis kunvenon de la laborgrupo “Aktiva Eŭropa Civitaneco” kadre de la programo “Eŭropo por Civitanoj”.

Ĉi tiu programo de la Eŭropa Komisiono (EK) celas proksimigi Eŭropon al la civitanoj kaj ebligi al ili partopreni en konstruado de Eŭropo. La programo financas multajn projektojn, urboĝemeligojn kaj funkciadon de kelkaj eŭropaj neregistaraj organizoj. Inter la organizoj, kiuj ĉi-jare ricevis subvencion, estis ankaŭ EEU. Pere de “Aktiva Eŭropa Civitaneco” EK celas dialogon kun organizoj, kiuj laboras sur la kampo de aktiva eŭropa civitaneco.

Por EEU la laborgrupo estas grava ebleco kunlabori kun EK, plibonigante la programon kaj aŭskultante pri la sukcesoj kaj malsukcesoj de aliaj kunlaborantaj organizoj. La prezidanto de EEU Seán Ó Riain plurfoje kontribuis al la diskutoj prezentante la laboron de EEU.

**Maja Tišljár**

(Laŭ *Eŭropa Bulteno*)

## Buller vizitis Koreion

Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de UEA, vizitis en oktobro Korean Respublikon. Li partoprenis en la 40a Korea Kongreso de Esperanto, kiu okazis 18–19 okt en Busan (vd. pĝ. 9) kaj dediĉis unu tagon al konatiĝo kun la kondiĉoj por ebla okazigo de Universala Kongreso de Esperanto en Busan en 2012.

Post la sukcesa Seula UK en 1994 koreaj esperantistoj, kun forta subteno de urbaj kaj landaj aŭtoritatoj, pretas gastigi UK-on en Busan, kie troviĝas elstare bona kongresejo. Kandidatiĝo de Busan por UK 2012 estis la ĉefa diskutemo dum la renkontiĝoj de Buller kun la Busana vicurbestro An Joon-Tae, kaj poste en Seulo kun la vicprezidanto de la Korea Turisma Organizaĵo Hong Ju Min kaj la ĉefmanaĝero de la Korea Kongresa Buroo Jaesung Rhee.

La vizito donis bonan okazon por interparoloj kun prezidanto Park Wha-Chong kaj aliaj estraranoj de KEA pri vasta gamo da komunaj temoj. Tre utilaj estis la intertraktoj pri movadaj demandoj de Azio kun Lee Jung-kee, prezidanto de la Komisiono pri Azia Esperanto-Movado. En Seulo Buller vizitis ankaŭ la oficejojn de KEA kaj de Seula Esperanto-Kulturcentro.

**GK UEA**

## Kandidatiĝo por IJK en 2010



IJK (Internacia Junulara Kongreso de TEJO) estas plej granda kaj plej grava esperantista junulara renkontiĝo.

Lastatempaj IJK-oj okazis en la Orienta Eŭropo kaj en Sud-Orienta Azio: en Kovrov (Ruslando, 2004), Zakopane (Pollando, 2005), Sarajevo (Bosnio kaj Hercegovino, 2006), Hanojo (Vjetnamio, 2007), Szombathely (Hungario, 2008); la venontjara 65a IJK okazos en Liberec (Ĉeĥio).

TEJO invitas kandidatiĝi por la organizado de la 66a Internacia Junulara Kongreso en la jaro 2010. Eblas kandidatiĝi ĝis 15 dec 2008. Ĉi-jare la nova TEJO-komisiono transprenos parton de la organiza laboro.

**TEJO** preparos kun vi buĝeton; varbos por la evento; provizos retpaĝaron, aliĝsistemon, datenbazon, projektmastrumadon, vikion; helpos pri subvencipetado.

**Via teamo** trovos kaj traktos kun ejoj; preparos programon; surloke organizos; librotenos; traktos invitleterojn; traktos lokajn kontaktojn; metos informojn en la paĝaron.

Por ĉiuj demandoj kontaktu TEJO-estraraninon por IJK [vildana@tejo.org](mailto:vildana@tejo.org)

**Vildana Delalić**

## UEA kaj KCE en Lisbono

Laŭ informoj de GK UEA kaj de HeKo, du instancoj, sendepende unu de la alia, reprezentis Esperanton en la internacia konferenco de Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo (ALTE) 12–15 nov en Lisbono.

Delegito de UEA, Zsófia Kóródy, speciale atentigis pri la nova ekzamensistemo ellaborita surbaze de la Komuna Eŭropa Referenckadro kunlabore kun la Hungara Ŝtata Ekzamencentro. Ŝi raportis al la diverslingvaj fakuloj per detale ellaborita projekciado kaj prezentis specimenojn el la Esperantlingva testaro. Ŝi partoprenis ankaŭ en kelkaj fakaj laborgrupoj, interalie en tiu pri la lingva testado de infanoj kaj junularo.

Giorgio Silfer, delegito de Kultura Centro Esperantista, kadre de la laborgrupo pri lingvotestado por specifaj celoj, prezentis raporton pri la spertoj rilate al ekzameno, okazanta kadre de la LingvoTesta Sistemo de la Esperanta Civito.

## Scienca simpozio en Zagrebo

7–8 nov en Zagreba Filozofia fakultato okazis internacia scienca simpozio “Esperanto kaj la kroata identeco” dediĉita al 100-jariĝo de la Esperantomovado en Kroatio.

Estis prezentitaj 23 prelegoj. Eble la plej interesa estis prezento de la enketaĵo pri interesiĝo pri Esperanto en Zagrebo. Helpe de pluraj studentoj Anđel Starčević kaj Renata Geld enketis 191 homojn en du kategorioj: ĝenerala popolo kaj studentoj. Laŭ la enketo, en Zagrebo ĉ. 30% de la ĝenerala popolo scias sufiĉe multe pri Esperanto kaj pretas ĝin lerni. 94% de studentoj pri informadiko tre malmulte scias pri Esperanto, sed 100% de studentoj pri la angla lingvo scias, kio estas Esperanto, kaj 65% el ili lernus ĝin.

Elstaris prelegoj de Nikola Rašić pri la signifo por Esperanto de doktoro Dalibor Brozović kaj pri interlingvistika laboro de Tomo Maretić, kaj de Ulrich Lins pri Ivo Lapenna. István Ertl prelegis pri “Limoj de neŭtraleco”.

La simpozion aŭspiciis la prezidento de Kroatio Stipe Mesić, kiu sendis salutleteron. Oni devas danki al profesoro Velimir Piškorec, estro de la ĝermana fako de la fakultato, kiu organizis la tuton kaj iniciatis plurajn esplorojn kiujn efektivigis li kaj kolegoj kaj ankaŭ pluraj studentoj por la simpozio. Danke al li la studentoj havas la studobjekton pri interlingvistiko kaj esperantologio.

Dum la simpozio en aŭlo de la fakultato oni povis vidi imponan ekspozicion pri Esperantaj filatelajoj.

**Zlatko Tišljár**

## Poŝtmarka omaĝo en Aŭstrio

1 dec 2008 aperas la aŭstria poŝtmarko “Esperanto.net” okaze de la jubileo “100 jaroj Universala Esperanto-Asocio UEA”. Unu ekzemplero estas senkoste havebla ĉe: [esperanto@chello.at](mailto:esperanto@chello.at)

**Walter Klag**





## Amasa kongreso en Japanio

(Landa Agado) Ĉirkaŭ 480 aliĝintojn allogis la 95a Japana Esperanto-Kongreso, kiu okazis 11–13 okt en Wakayama, ĉ. 10 km sude de Oosaka. Inter ili estis Park Wha-Chong, prezidanto de Korea Esperanto-Asocio; Lee Jung-kee, prezidanto de Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM), Mireille Grosjean, komitatano de UEA, Marie-France Conde Rey, vickonsulo de la Esperanta Civito k.a.

La urbestro de Wakayama, Oohasi Ken'iti, salutis en la inaŭguro kaj konfesis, ke li havas faman parencon esperantiston Kurisu Kei.

La kongreso havis la temon “Regiono kaj la mondo — Diverseco, Renkonto, Disvolviĝo”. Okazis pli ol 40 fakaj kunsidoj, ekzamenoj de Japana Esperanto-Instituto (JEI), amika vespero, bankedo, libroservo. Partoprenantoj sonorigis sonorilon por paco en preĝejo ekster la kongresejo. Kadre de la Kongreso okazis publika simpozio pri Internacia Jaro de Lingvoj, kun ĉ. 350 homoj inkluzive de neesperantistoj.

Okaze de la kongreso JEI eldonis la libron *La edzino de kuracisto Hanaoka Seisyu* de Ariyosi Sawako, kiun tradikis Konisi Gaku, kiel la 45an volumon en la serio *Oriento-Okcidento*, sub la aŭspicio de UEA.

La 96a Kongreso okazos 10–12 okt 2009 en la urbo Koohu, Yamanasi, kun la temo “Esperanto, Tergloba lingvo de la 21a jarcento — 150a datreveno de Zamenhof”.

**Hazama Hirotomi**

## Eta kongreso amikec-etosa

La 9a Esperanto kongreso de Ĉugoku-Ŝikoku okazis 1–2 nov en la urbo Jamaguĉi, en la plej okcidenta prefektejo de la japana ĉefinsulo kun 54 aliĝintoj.

Ni ekskursis en karsta plataĵo, en kaverno kaj en scienca muzeo de Akijoŝi, omaĝe al la anglo Edward Gauntlett, kiu la unua esploris la kavernon. Por la japana esperantistaro li estis ankaŭ fruopoka disvastiganto de Esperanto ekde 1891.

La kongreson daŭrigis bankedo kun salutoj, tosto, sin-prezentado, aŭkcio ĝoje kaj gaje.

La duatagan programon malfermis ludo de infanoj, kiuj saltis kaj kantis japane kaj Esperante. Poste ili rakontis kun la instruistino Oŝioka *S-ron Pape-ron*, samtempe faldante aŭ deŝirante

paperon kune kun ĉiuj partoprenantoj. Rakonto iris ĝis “kaj tulipoj floras en la ĝardeno...” kaj denove infanoj ekkantis japane kaj Esperante.

Sekvis prelegoj. Micuo Okamoto, honora profesoro de la universitato en Hiroŝimo, prelegis pri la temo “Mi lernas Esperanton celante firmigi rajton pri paco kaj lingvo”.

La temo de la svisa eksinstruistino Mireille Grosjean estis “Svislando estas la mozaika ŝtato”. Ŝi gvidis nin tra sia ŝtato, akcentante pacan edukadon.

Ecuo Mijoŝi parolis pri Esperanto kiel la oficiala lingvo de la Eŭropa Unio. Li firme kredas sian mision pri tio kaj aperigis tutpaĝajn reklamojn pri Esperanto en famegaj eŭropaj ĵurnaloj.

Okazis ankaŭ du konversaciaj rondoj, gviditaj de s-ino Grosjean kaj s-ro Miedema. Ĉiuj estis kontentaj, ke la etoso de la eta kongreso estis tre amikeca.

**Tomiko Ikeda**



Infanoj gajigis la kongreson en Jamaguĉi.

## Esperanto sonas en montaro

22 okt 2008 Esperanto estis prezentita en Sarada mezgrada lernejo, Bhojpur, 500 km for de Kathmando, en la orienta montara parto de Nepalo.

Chol Nath Porkharel, prezidanto de ONES (Orienta Nepala Esperanto-Societo) prelegis pri la naskiĝo kaj utiligo de la lingvo. Li klarigis per ekzemploj, ke ĝi estas pli facila ol etnaj lingvoj kaj demandis la gelernantojn, ĉu ili parolas la anglan post 11-jara lernado. Multaj diris, ke ili ne bone parolas la anglan, kaj li diris, ke trimonata serioza lernado de Esperanto, sufiĉas por paroli ĝin.

Poste mi prelegis pri la utileco de Esperanto. Ganesh Neupane, sekretario de ONES, rakontis pri sia partopreno en la 5a Azia Esperanto-Kongreso en Barato.

En la demanda horo, multaj petis lernomaterialon kaj librojn. La aŭskultantaro estis granda, ĉar la prezentado, kiun iniciatis la direktoro de la lernejo, estis deviga por la lernantoj kaj instruistoj.

**Bharat Kumar Ghimire**

## Per la reto la mondo malgrandas

En la ĉina urbo Foshan, proksima al Kantono, 17 okt 2008 okazis interesa lerneja eksperimento en la kurso de Esperanto instruata ĉe la Altlernejo pri Porprofesiaj kaj Teknikaj studoj de tiu urbo, kun la partopreno de ĉirkaŭ 50 kursanoj, inter kiuj ankaŭ kelkaj profesoroj.

Profitante la bonajn teknikajn eblecojn de la lernejo oni starigis retbabiladon kun pola esperantistino, Graĉyna, instruistino el la pollanda urbo Toruń. La junaj gelernantoj havis la okazon paroli kun ŝi pere de la reto, kaj eĉ vidi ŝin en giganta ekrano.

La pola instruistino kaj la ĉinaj gelernantoj interŝanĝis salutvortojn, faris facilajn demandojn, kaj ŝi eĉ povis rigardi kiel oni instruas Esperanton al la gejunuloj. Surprize, en la klaso aperis brazila esperantisto Silvio Kniess, kiu ankaŭ babiladis kun ili. Ĉiuj, ĉefe knabinoj, estis ravitaj de li, alta, bonhumora, belaspekta.

La profesoro demandis ilin: “Vi devige studas la anglan lingvon dum multaj jaroj. Kun kiom da eksterlandanoj ĝis nun vi parolis pere de la angla lingvo?” Ĉiuj respondis: “Kun neniu”. Sed nun nur en tri tagoj ili povis retbabiladi kun franca esperantisto Michel Fontain, kun pola esperantistino Graĉyna, kaj vid-al-vide kun brazilano Silvio kaj kun ilia hispana instruisto Augusto Casquero. Loka televido ĉeestis tiun eksperimenton kaj favore raportis. Kompreneble fine de la klaso okazis “foto-sesio” en kiu partoprenis ankaŭ la konata ĉina esperantisto Ĉielismo.

Ĉiusemajne dufoje oni ripetos tiun interesan kaj allogan sperton, kun alilandaj samideanoj, prefere junaj, ĉar pli allogaj por la junaj kursanoj.

Ili lernas bone, diligente, lerte. Oni pensas ke Esperanto estas lingvo malfacile lernebla por ĉinoj, sed tio tute ne okazas en ĉi tiu kurso. Junaj homoj facile lernas, rapide adaptiĝas al la prononcado de la nova lingvo. Kaj mi mem, kiel ilia instruisto, estas ege kontenta kaj kortuŝita instrui ilin. Ĉiuj afablaj, ĝentilaj, laboremaj. La etoso en la klasĉambro estas ege amikeca kaj gaja.

La organizantoj de la kurso, s-roj Jin Peng (lernejestro) kaj Liu Weizhuan (Ĝenerala Sekretario de la Kantona Esperanto-Asocio), deziras ke tiuj kursoj daŭre kaj longe okazu.

**Augusto Casquero**

(Vidu la grup-foton en la 27a paĝo.)



## Koreio: Esperanto en perspektivo

172 esperantistoj el kvin landoj partoprenis en la 40a Korea Kongreso de Esperanto, okazinta 18–19 okt Ohmyland Busan (refreŝiga ripozejo por junuloj). La kongresa ĉeftemo estis “Esperanto en perspektivo: En la nova ondo de monda civilizacio”. Inter la ĉeestantoj troviĝis ĝenerala direktoro de UEA, Osmo Buller invitita de Korea Turisma Organizo. Li vizitis la urbon Busan ne nur por partopreni la kongreson, sed ankaŭ por taksi la kondiĉojn por la eventuala okazigo de Universala Kongreso en ĉi tiu urbo (vd. pĝ 7).

Kadre de la kongreso okazis simpozio sub la kongresa temo. Laŭ la prezido de Ho Song (vicprez. de KEA) surpodie prelegis kaj diskutis kvar personoj. Park Yongsung (sekretario de Busan-Kyeon-gnama filio de KEA) starigis demandojn por pli aktive pripensi la Esperanto-movadon, montrante ekzemplojn de fiŝkaptado surekrane. Kawanisi Tetsuro (estro de Isikawa Esperanto-Asocio) prezentis la agadon en Isikawa kaj akcentis bezonojn de aktiva Esperanto-lernado, reciprokecon de amikecaj kaj kulturaj interŝanĝoj kaj informadon al neesperantujo pri Esperanto. Peng Zhengming (vicprez. de Wuhan-a Esperanto-Asocio) informis pri la revigliĝo de la movado en Ĉinio, t.e. multiĝo de junaj lernantoj, aktivuloj, kaj interretaj hobiemuloj en Esperanto. Osmo Buller retrospektive prezentis la Esperanto-movadon de ĝia naskiĝo ĝis nuna stilo tra la malfaciloj.

Lee Jung-Kee gvidis kunvenon de aktivuloj de la azia Esperanto-movado. Okazis fakaj kunsidoj de katolikoj, kristanoj, oomotanoj, ŭonbulismanoj, vegetaranoj, redakcianoj de la Korea Esperanto-Asocio k.a.

En la kongresa universitato prelegis Kwak Jonghun pri Esperanta kulturo en Koreio kaj pri korea kulturo en Esperanto, kaj Osmo Buller pri UEA kiel reprezentanto de la esperantistaro en mondaj forumoj.

LKK eldonis du specojn da biletoj kun portreto de Zamenhof respektive por 1000 kaj 500 spesoj kaj donacis al ĉiu kongresano po 2000 spesojn. Oni povis ĝui tiom da rabato per la biletoj en la libroservo aŭ vendejo dum la kongreso. Furoris verda ĉemizo, kiun LKK faris kiel memoraĵon de la 40a Korea Kongreso de Esperanto. Multaj ĉeestantoj laŭdis la organizantojn pro la pena laboro por la sukcesa kongreso.

**Kim Uson**



La korea (foto supre) kaj la vjetnama (artikolo sube) asocioj volas inviti UKon en 2012.

## Vjetnamio antaŭen marŝas

La 4a Kongreso de Vjetnama Esperanto-Asocio okazis 25 okt en Hanojo. Partoprenis en la Kongreso Tran Dac Loi, vicprezidanto de Vjetnama Unio de Amikecaj Organizoj, reprezentantoj de hanoja gazetaro, televido, de Centro por daŭriga edukado Nguyen Van To, vjetnamaj esperantistoj kaj Lee Jung Kee — prezidanto de Komisiono de UEA por Azia Esperanto-Movado (KAEM).

La kongreso bilancis la agadon de VEA dum la kvinjara periodo.

Ekde la komenco de sia oficperiodo, la Plenumkomitato kreis Trejnan sekcion. La sekcio difinis A-B-C lingvajn nivelojn kaj rekomendis uzendajn lernolibrojn. En Hanojo kaj Ho Chi Minh urbo (HCM) funkciis multaj Esperanto-kursoj. Precipe sukcesis la kursoj de alilandaj instruistoj: Franciska Toubale, Hori Yasuo, Przemek Grzybowski, Zgu Xin... Nun en HCM malfermiĝis kurso por laosaj studentoj kun intenco “verdiĝi Azion” laŭ la plano de KAEM. Poste tiuj studentoj revenos en sian landon kaj tie disvolvos la movadon.

Ekstera informado estas ankoraŭ malforta, kaj la ĉefa sukceso estis ĉe la Fremdlingva Universitato kie antaŭ IJK-63 ĉ. 400 studentoj enskribiĝis por lerni Esperanton. Estis presita dukolora foldfolio kaj kreita migranta ekspozicio.

VEA eldonas sian organon, *Verda Mesaĝo el Vjetnamio*. Siajn informilojn eldonas asocioj en Hanojo kaj HCM kaj la junulara asocio VEJO. Diskutlisto “Vjetnamaj esperantistoj” havas 110 membrojn. VEJO kunlaboris kun junuloj el Japanio, Koreio, Ĉinio pri eldonaĵo de la retgazeto *La Amikeco*, kiu lastatempe ĉesis aperi.

La ĉefa organiza atingo estis gastigado de IJK-63 pasintjare en Hanojo. Printempaj Renkontiĝoj regule okazas en marto ĉiujare. Oni organizis multajn interesajn kunvenojn, ekskursojn kaj naskiĝdatrevenojn.

Hanoja E-Asocio (HanEA) kaj Hanoja Unio de Amikecaj Organizoj (HUAO) daŭrigas la ĉiujaran konkurson *Hanojo, via rendevuejo* por la internaciaj amikoj en Esperanto kaj en kvin aliaj lingvoj. HanEA aktive partoprenis en aliaj eventoj de HUAO: Kantkonkurso pri Amikeco, Gastronomi konkurso, Porpaca kurado. Kuracado per Yumeiho-metodo estas daŭre praktikita ĉe la Medicina sekcio de HanEA.

Kiel popol-diplomatia organizo, VEA uzas la internacian lingvon por plifirmigi la integriĝon kun la monda komunumo. Kvankam la financaj kondiĉoj de vjetnamoj estas modestaj, ekde 2003 en ĉiu UK, IJK kaj AK (Azia E-Kongreso) ni havis partoprenantojn. Kumaki Hideo ricevis de la vjetnama ŝtato Amikecan Medalon pro multaj iniciatoj kaj agadoj helpe al Vjetnamio. VUAO donacis al Renato Corsetti Memormedalon pri Amikeco.

En la kongreso Nguyen Van Loi kaj Nguyen Xuan Thu estis reelektitaj respektive kiel la prezidanto kaj ĝenerala sekretario de VEA. Krom la reelektitaj vicprezidantoj Tran Quan Ngoc kaj Hoang Ngoc Boi estis elektita nova juna vicprezidantino Nguyen Phuong Mai. Nun sep el la dek unu komitatoj estas malpli ol 30-jaraj.

La ĉefa tasko de la nova oficperiodo estas preparado de kondiĉoj por kandidatiĝi kaj gastigi la Universalan Kongreson (UK) en la jaro 2012.

**Nguyen Xuan Thu**

## Esperantistoj en druza vilaĝo

23–25 okt okazis la 9a Komuna Israela Esperanto-Semajnofino (KIES).

KIES okazas ekde la jaro 2001, kiam israelaj esperantistoj, eble pro la entuziasmo pri la 85a UK organizita en la antaŭa jaro en Tel-Avivo, unuafoje kuraĝis organizi dutagan landan kunvenon (en la dezerta urbo Arad). De tiam KIES gastis en diversaj turismaj lokoj en Israelo, kiel la Morta Maro (dufoje), Jerusalemo (dufoje), kibuco apud Lage de Galileo, Hajfo (apud la Bahaa Centro). Ĉi-jare KIES unuafoje daŭris tri tagojn.

La 32 partoprenantoj gastis dum du noktoj en ĉarma gastejo en la druza vilaĝo Bet-Ĝan (Supra Galileo) kaj ĝuis variajn ekskursojn, kulturen kaj socian agadon kaj pliajn interesajn programerojn.

La programo havis la ĉeftemon “Folkloro, religioj kaj minoritatoj”. Kadre de tiu temo okazis ekskurso (gvidita de Nava Cinori, kiu kune kun Amri Wandel organizis ĉiujn KIES-jn) al la araba-kristana vilaĝo Ĝiŝ (Guŝ-Ĥalav) kaj vizito de la ĉerkesa vilaĝo Rihanija. Amri Wandel prezentis lumbildojn de triboj kaj minoritatoj en la nordo de Tajlando kaj Vjetnamio, gvidis naturan migradon tra kanjona rivero kaj vizitojn de du famaj judaj sanktaj tomboj apud la kabaleca urbo Zefado — “Ŝimon Bar Johai” kie oni tradicie unuafoje tondas la harojn de junaj knabetoj — kaj Jonatan ben Uziel, kiu estas pilgrimejo de piaj fraŭlinoj kiuj esperas trovi edzon. Kiel la ĉefa programo estis konatiĝo kun la druza kulturo (kutimoj, religio, manĝaĵoj ktp) per folkloro prezentaĵo.

Dum la folkloro prezentaĵo oni kutime montras tradician druzan gefianciĝan ceremonion, sed ĉi-foje okazis spica surprizo: Jarden, la filino de Nava, havis sian 12-an naskiĝtagon, kiu laŭ la juda religio estas konsiderata la adoleska aĝo por knabinoj (“Bat Micva”). La organizantoj kaŝe anstataŭis la aktorinon, kaj, malkaŝinte la vizaĝon de la fianĉino, aperis Jarden, kiu poste estis volvita per Esperanto-flago, kaj oni entuziasme dancis kaj festenis ĝis la noktomezo.

Kompare al la pasintjara KIES en Jerusalemo estis iom malpli da partoprenantoj, aparte mankis eksterlandanoj (pasintjare estis ses el tri landoj). Tamen la partoprenantoj estis tre kontentaj pri la etoso, la programo, la manĝaĵoj, la gastejo kaj... pri la vetero.

**Amri Wandel**



La plej juna partoprenantino Jarden Cinori festis en KIES-9 sian 12-jariĝon rolante en la folkloro prezentaĵo kiel druza fianĉino. (Amri Wandel)

## Argentino bilancas kaj planas

Dudeko da aktivuloj de la Argentina Esperanto-Ligo (AEL) la unuan tagon de novembro kunvenis en la asocia sidejo en Bonaero por la jar-sembleo de AEL.

La asembleo revuis la staton de la movado, konstatinte ke kreskas la nombro de retaj esperantistoj kaj malkreskas tiu de la tradiciaj membroj. La ret-kurso *IdEo* de D-ro Marcelo Casartelli (1928–2007) registris pli ol 50 mil vizitojn. Pluraj novaj grupoj fondiĝis sekve de la kampanjo lanĉita de AEL en 2004 por krei E-rondojn ĉie, kie iu esperantisto volus instrui aliajn. Eĉ estis kreita la Uŝuaia E-Rondo en Fajrolando — en la plej suda urbo de la mondo. Argentina E-Lernejo estis oficialigita de la Ministerio de Instruado. La reorganizita ArgentEJO denove aliĝis al TEJO. AEL partoprenas en la librofoiroj en Bonaero kaj Kordobo, kaj en aliaj ekspozicioj, kongresoj kaj publikaj kunvenoj pri edukado, kulturo aŭ instruado de lingvoj. La eldono de *La sekreta miraklo* de la fama argentina verkisto Jorge Luis Borges sendube estos okazaĵo de bona reklamado de Esperanto en la tuta lando.

La ĉefa “propono” de la Asembleo venontan jaron 2009 kiel Zamenhofa Memorjaro kaj jaro de la revivigo de la landa movado survoje al kandidatigo de Argentino por UK en 2012!”

Laŭ la asocia statuto estis elektita nova komitato, kun Silvia Rottenberg kiel la prezidantino.

**Roberto Sartor**

## La komiksa lingvo...

Dank’ al la helpo de Pisa Esperanto-grupo kaj de aliaj volontuloj, ankaŭ ĉi-jare Itala Esperantista Junularo kaj Itala Esperanto-Federacio starigis la kutiman informan budon okaze de la 42a *Lucca Comics and Games* — la plej grava kaj fama foiro pri komiksoj en tuta Eŭropo.

Dum la aranĝo, kiu kutime okazas en la semajno de haloveno, la toskanan urbon invadis festemaj junuloj kaj komiks-temaj maskuloj — la foiro altiris en la urbon pli ol 350 mil homojn. Inter la honorgastoj estis John Romita Jr (fama desegnisto de Marvel), Kohta Hirano (aŭtoro de Hellsing), Grzegorz Rosinski (pola desegnisto), Ligabue (fama itala kantisto) kaj Dario Argento (reĝisoro).

Speciale por la foiro la Itala E-Federacio eldonis poŝ-kalendareton kiu estis disdonita kune kun esperanta bildstria flugfolio. Multaj scivolemuloj proksimiĝis al nia budo: iuj por peti informojn, iuj aliaj altiritaj de la esperantigitaj versioj de famaj komiksoj, kiujn bedaŭrinde ni ne rajtis vendi malgraŭ la multaj petoj.

Kune kun *Lucca Comics* oni organizis ankaŭ la 3an EsperanTagon; al la tuttaga aranĝo partoprenis deko da junuloj al kiuj la lokanoj, evitante la tro homplenajn zonojn, sukcesis montri la kaŝitajn vidindaĵojn de la urbo.

**Oliviero Bagnoli**

## Subĉiela Leciono

La lastan oktobran sabaton Lorena Esperanto-Klubo okazigis plian *Subĉiela Lecionon*. Ĉi-foje, dek unu samideanoj vizitis la bieneton kaj la domon, kie naskiĝis la fama brazila verkisto Monteiro Lobato — la “Bieneton de la Flava Pego” en la urbo Taubaté, ŝtato San-Paŭlo.

En bela vetero la grupo legis biografeton de Monteiro Lobato kaj praktikis dialogon pri la teksto. Poste oni lernis la nomojn de pluraj birdoj en Esperanto. Sekvis promeno tra la bela bieneto kaj vizito al la domo, kiu funkcias kiel muzeo. Oni fotis la grupon, kaj multaj turistoj atentis pri la uzado de Esperanto kaj pri la verda flago. Post la promenleciono la grupeto lunĉis en agrabla restoracio, en Taubaté.

Oni planas okazigi la sekvan *Subĉiela Lecionon* komence de 2009 ĉe “Bieneto de Floroj” en Lorena.

**Paulo Sérgio Viana**





**KAEST:** Prelegas Yves Nevelsteen, aktivulo de E@I kaj de la Esperanta Vikipedio. (Fotis Petro Chrdle)

## Nova etapo de KAEST

7–9 nov okazis en Dobřichovice apud Prago Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST) kun 48 partoprenantoj el 13 landoj.

Oni komencis la konferencon rekte per la sciigo, ke ĉi-jara KAEST estas la lasta, okazanta en Ĉeĥio kaj la lasta, kiun organizas ĝisnuna motoro de la aranĝo Petro Chrdle (kun granda helpo de lia dekstra mano Zdeněk Pluhař). Laŭ la interkonsento kun la teamo de E@I estas ĝi, kiu transprenos organizadon de la aranĝo kaj zorgos pri ĝia pluekzisto kaj disfloro. Per tio KAEST revenos tien, kie ĝia historio komenciĝis: en 1978 la unua Konferenco okazis en la slovaka urbo Ĉilina. Ĝis 1989 ĝi estis organizita alterne en Slovakio kaj Ĉeĥio, post naŭjara paŭzo ekde 1998 nur en Ĉeĥio.

Post la enkondukaj vortoj jam okazis la prelegoj — diversfakaj, diverstemaj, diversnivelaj. Komenco apartenis al Detlev Blanke kaj lia temo — ege taŭga por nia E-komunumo: “La rolo de amatoroj ĉe la progresigo de scienco”.

Sekvis prezento de “Kvar jaroj de Konstru-Forumo” de Jan Werner, poste László Szilvási resumis la kvinjaran funkciadon de la Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko (STEB). Ne eblas menciigi ĉiujn prezentojn kaj prelegojn — temoj abundis kaj eblis ekscii multon de tiom diversaj fakoj kiel gastronomio,

robotiko, geodezio, medicino, juro, mekaniko...

Ĉi-jara novaĵo estis mini-trejnseminario pri Vikipedio — por instrui kaj spertigi diversflankajn fakulojn iĝi ne nur pasivaj uzantoj de tiu ĉi libera interreta enciklopedio, sed ankaŭ ĝiaj aktivaj kontribuantoj. Ankaŭ tiamaniere eblis levi la fakon nivelon de Esperanto-artikoloj kiuj tie aperas. En la seminario estis prezentitaj la manlibro de Ziko van Dijk *Vikipedio por vi*, ĵus eldonita de E@I, kaj la projekto *Vikipedio por ĉiuj*.

Ege grava por plibonigi rilatojn kaj starigi novajn kontaktojn, elpensi novajn projektojn kaj kunlaboron estis la neformala parto de la programo en koridoroj post kaj antaŭ prelegoj.

Laŭ ĉiuj vidpunktoj ĉi-jara KAEST estis ege bona kaj sukcesa — certe imitinda aranĝo ankaŭ por aliaj mondo-partoj.

La lasta programero estis publika diskuto pri la estonteco de KAEST. Peter Baláč prezentis la lokon kaj kondiĉojn de KAEST 2010, kiu okazos novembre 2010 en la urbeto Modra, apud Bratislava. Plano estas aranĝi je unu tago pli longan KAEST, kun aldonaj trejnseminarioj kaj du paralelaj sekcioj — ĉeftema kaj ceteraj fakoj.

Ĉiufoje post KAEST aperas prelegokolekto. Interesatoj pri la ĉi-jara (kaj pri la antaŭaj) turnu sin rekte al la organizanto ([www.kava-pech.cz](http://www.kava-pech.cz)) aŭ al la libro-servo de UEA.

**Peter Baláč**  
E@I-kunordiganto

## Vassouras: kurso kaj ekspozicio

En la universitato Severino Sombra, en la urbo Vassouras, ŝtato Rio-de-Ĵaneiro, dum la tuta oktobro funkciis ekspozicio omaĝe al la plej granda brazila verkisto Machado de Assis, okaze de la centjariĝo de lia forpaso. Inter la montrataj libroj troviĝis pluraj tradukoj en Esperanto: *La alienisto*, *Postmortaj rememoroj de Brás Cubas*, *Dom Casmurro*, *La divenistino kaj aliaj rakontoj*, *Teatro*.

En la sama universitato okazis de 6 aŭg ĝis 24 sep postdiploma kurso pri Esperanto, por propedeŭtika stimulado al lernado de eksterlandaj lingvoj.

(Laŭ *BEL informas*)

**Ne forgesu  
(re)aboni**

## Esperanto-semajno en Katalunio

La 16a Internacia Esperanto semajno de la kulturo kaj turismo okazis 4–11 okt 2008 jam la trian fojon en la pitoreska kataluna ripozurbo Salou, ĉ. 100 km sude de Barcelono.

La turismo ŝanĝis la pejzaĝon kaj la vivmanieron de tiu ĉi regiono. Preskaŭ malaperis la agrikulturo kaj la fiŝkaptado: la loĝantaro de la Mediteranea marbordo portis siajn terkulturajn laborilojn kaj fiŝkaptilojn al muzeoj kaj plene sin dediĉis al turismo. Ĉe la bordo de Mediteraneo, kie antaŭe estis kelkaj kabanjoj de fiŝkaptistoj, hodiaŭ troviĝas gigantaj domblokoj, kiuj somere ŝajnas homaj formikejoj, kie multaj eksterlandanoj pasigas siajn feriojn, ĝuante la sunajn radiojn, kiujn malavare sendas ĉi tien la naturo.

Ankaŭ 128 geesperantistoj el dek unu landoj ĝuis veluran sezonon en Salou, ĉar la aera kaj la mara temperaturoj variis inter 21 kaj 24 gradoj.

La inaŭguran ceremonion partoprenis oficialaj personoj de la urba konsilantaro, ja nia movado havas subtenon en Salou, kie ekzistas Esperanto-strato, kaj dum la Semajno oni inaŭguris memortabulon. Pri ĉi okazintaĵo lokaj gazetoj aperigis du artikolojn.

Krom ripozo ni havis abundan seriozan kaj distran programon. Estis prezentitaj kelkaj prelegoj. Kvinfoje okazis Esperanto-kurso, kiun ĉi foje gvidis Aldis Buš el Latvio. Apartan intereson ĉe la kursanoj havis matematikaj taskoj kaj ilia apliko en la Esperanto-instruado. Ĉiuvespere okazis diskutoj, distra programo aŭ koncerto. Por ekkoni katalunan muzikon nin ĝojigis la folkloro grupo *Penjats de lham*.

Apud la hotelo *Mediteraneo*, kie pasis la ĉefaj programeroj kaj kie loĝis la partoprenantoj, troviĝas etnografia subĉiela muzeo, en kiu ni vidis la vivkondiĉojn kaj vivmanieron de la loka loĝantaro antaŭ jarcentoj. Krome ni vizitis interesan fervojan muzeon en Vilanova i la Getru kaj vinmuzeon en Vilafranca del Penedes. Dum la tuttaga ekskurso en Barcelono ni vizitis la katedralon, la ripozcentron en Tibidabo kaj aliajn vizitindaĵojn, inkluzive de la strato Zamenhof, kiun esperantistoj nepre devas viziti.

Fine mi volas danki la ĉefajn organizantojn, Luis Serrano kaj Salvador Aragaj, pri iliaj klopodoj por sukcesigo de la aranĝo kaj pro la bonegaj kondiĉoj.

**Jurate Bušiene**

## 15-jara partnereco

23 okt 1993 estis subskribita ĝemel-urba kontrakto inter Góra en Malsupra Silezio, Pollando, kaj Herzberg am Harz — la Esperanto-urbo en Germanio.

Ekde komenco de 2005 ambaŭ urboj uzas oficiale ankaŭ Esperanton por la interurbaj kontaktoj. Jam dekfoje okazis interŝanĝoj de esperantistoj inter ambaŭ urboj. Trifoje okazis interŝanĝoj de gelernantoj kun geinstruistoj danke al Esperanto kun bonega sukceso.

Je la dek-kvina datreveno de la kunlaboro, 23 okt 2008 la Esperanto-Centro en Herzberg malfermis porokazan ekspozicion en la urba biblioteko. Gerhard Walter, la urbestro de Herzberg, emfazis la gravecon de Esperanto por la praktika interkultura dialogo de civitanoj inter ambaŭ urboj. Peter Zilvar, la estro de la Esperanto-Centro, prezentis la ekspozicion, kiun konsistigas 15 tabuloj pri la historiaj evoluoj, libroj, fotoalbumoj, desegnaĵoj ktp, kaj donacis al la urbestro belan memorŝildon kun la esperantlingva titolo “Ni estas partneroj” kaj la du urbaj blazonoj. La urbo Herzberg fiksas la ŝildon ĉe la urbodomo. Tio estos daŭrepova reklamo por Esperanto.

La sekvan tagon (24 okt) komenciĝis tritaga vizito de la delegitaro de Herzberg en la ĝemelurbo Góra. En la oficiala delegitaro, gvidita de Gerhard Walter, ĉeestis Peter Zilvar kiel reprezentanto de la Germana Esperanto-Centro. La Esperanto-delegitaro konsistis el Zsófia Kóródy, Yeong-ok Song, Otto Kern, Marika Frense, Sándor Hideg (Hungario), Teu Kim (Koreio) kaj Sebastian Kirf, kiuj estis gastoj de la Esperanto-Klubo en Góra.

Okaze de la jubileo estis feste inaŭgurita speciala ekspozicio en la urbodomo. En historia filmo pri la subskribo de la urbpartnerca kontrakto ni povis vidi i.a. la faman Esperanto-pioniron Joachim Gießner el Herzberg.

Posttagmeze en la urba kulturdomo okazis granda festo kun ĉ. 400 partoprenantoj kaj grandaj Esperanto-delegacioj. Venis famaj muzikistoj el Varsovio. Dum la festprelegoj kelkfoje oni menciis la rolon de Esperanto en la interkulturaj kontaktoj inter ambaŭ urboj. La urbestro de Herzberg donacis al sia pola koleginino, urbestrino Irena Krzyszkiewicz, pentraĵon kun la kastelo Herzberg, Esperanto-memorŝildon por fiksado ĉe la enirejo de la urbodomo en Góra, kaj esperantlingvan memormedalon el Herzberg.

Aperis belega porokaza festkajero en kiu estas, interalie, multaj fotoj rilate al Esperanto-praktikado inter ambaŭ urboj. Sebastian Kirf el Emden volas verki magistran disertacion pri “Esperanto-pontlingva projekto inter Góra kaj Herzberg”. Al la Eŭropa Esperanto-Kongreso je Pentekosto 2009 al ni venos esperantlingva delegacio el Góra, eble ankaŭ kun Irena Krzyszkiewicz, kiun Gerhard Walter invitis al la Esperanto-urbo por ĉi tiu eksterordinara internacia evento.

ICH

## Efika instruista trejnado

Komence de oktobro AGEI, Landa Sekcio de ILEI kun Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg la kvaran fojon organizis renkontiĝon Torpedo por Esperanto-instruistoj, instruantoj, instruontoj. Ĉi-jare kunvenis dudeko da fakuloj el sep landoj, do regis vere internacia etoso.

La specialaĵo de la nuna Torpedo estis nova eksperimento: paralele okazigi lingvokurson por komencantoj kaj metodikan seminarion por instruistoj. Zlatko Tišljar gvidis tritagan kurson kaj demonstris la Zagreban metodon per publikaj lecionoj kun komencantoj el Herzberg kaj la sud-Harza regiono. La observantoj povis ricevi de sperta fakulo la teknikon gvidi kurson por komencantoj kaj povis analizi, priparoli la observitan lecionon kun la kursgvidanto, diskuti, (mal)konsenti.

La lingvokurso kaj programeroj estis filmitaj. Ili aldoniĝos al aliaj metodikaj filmoj, fakprelegoj, registritaj lernejoj kursoj, kaj certe bone servos la pluklerigadon de estontaj partoprenantoj.

Stefan MacGill gvidis kurson pri rolludado kun elstara realigo de du roluloj, verkitaj kaj organizitaj de la kursoj mem. Sabine Trenner gvidis kurson pri Cseh-metodo. Rudolf Fischer gvidis pritaksan sesion pri la konformeco de germanaj lernolibroj al la postuloj de la novaj Eŭropaj ekzamenaj normoj.

*Ŝildo por la urbodomo en Góra*



Al la programo kontribuis ankaŭ Claude Tresorier (kunlaboro inter Esperanto-centroj), Petro Zilvar (movadaj informoj, evoluoj en la Esperanto-urbo) kaj Zsófia Kóródy (instruado en lernejoj, Comenius-projekto kun Springboard-eksperimento).

12–14 dec en la Esperanto-urbo okazos sekva studsesio. Temos pri la novaj ekzamenoj kaj ĉefe pri literaturo (Lena Karpunina, Gerd Bussing, Peter Zilvar) kun speciala kultura programo dum la tradicia Zamenhof-festo. En 2009 sekvos serio de trejnkursoj kaj studsesioj.

Zsófia Kóródy

## Studi per Esperanto

20–28 sep en Bydgoszcz (Pollando) okazis la 33a Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo, organizita de la Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo *Kujavio kaj Pomerelio*. Kadre de la Forumo okazis sesio de AIS-Klerigejo Bydgoszcz — Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo.

Okaze de la Monda Tago de Turismo (27 sep) kun partoprenantoj de la Forumo kaj Sesio renkontiĝis la urbestro de Bydgoszcz, mag. Konstanty Dombrowicz, kiu prezentis precipe la atingojn kaj planojn de la urbo.

Okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj (26 sep) pri lingvoj en diplomatio prelegis prof. Dr. Remigiusz Mielcarek kaj prof. dr hab. Adam Sudoł.

En la Monda Tago de Turismo prelegis pri “292 landoj de la mondo: lingvaj kaj vizaj problemoj” prof. dr Remigiusz Mielcarek, kiu mem vizitis 267 landojn. Internacian Esperanto-Turismon 2008/2009 prezentis ASci Andrzej Grzębowski, kaj la sesion resumis seminario bakalaŭro-magistra de AIS gvidata de prof. dr hab. Aleksandra Kowalczyk.

Peter Kuhnel gvidis bazan kurson de Esperanto por novaj studentoj. La lernadon de Esperanto kompletigis videokurso *Esperanto — pasporto al la tuta mondo*. Pri turismo kaj lingvoj en siaj landoj prelegis diverslandaj fakuloj. La forumon kaj sesion kompletigis vizitado de Bydgoszcz en Esperanto kaj filmoj pri Bydgoszcz kaj Esperanto-turismo en 42 landoj. Oni prilaboris la Turisman Esperanto-Kalendaron por 2009.

Tiamaniere oni inaŭguris la 18an studjaron en la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz. La studado ebligas laboron kiel Esperanto-vojaĝgvidanto en pli ol cent landoj de la mondo.

Andrzej Grzębowski



## Bibliaj Tagoj

Pri la psalmoj, centra riĉeco de la biblio por nia spirita vivo, prelegis 20–24 okt 2008 en la nord-germania klostro Nütschau patro Willibald Kuhnigk — tie loĝanta esperantisto.

Antaŭ 50 jaroj la benediktanoj fondis tiun klostron, hodiaŭ ĝi estas la spirita centro de la refondita arĥi-episkopejo Hamburg. Partoprenis esperantistoj el Germanio, Nederlando kaj Svedio.

Patro Willibald prezentis al ni la riĉecon de la psalmoj. Li montris sin spertulo ne nur en la esperanta Biblio, sed ankaŭ en la hebrea originalo, parolante sen manuskripto, parkere sciante la ligojn inter la psalmoj kaj aliaj bibliaj tekstoj komparendaj.

Kelkfoje tage nia preleganto devis ĉesigi la parolon, ĉar li devis kunkanti, preĝi kaj celebri en la benediktana preĝejo kune kun la aliaj monaĥoj. Tiam pastro Albrecht Kronenberger kantigis nin per la libro *Adoru* kaj per speciala nova kajereto kun “Psalmokantoj post Adoru”. Kelkfoje ankaŭ ni partoprenis en la Diservoj de la benediktana komunumo.

La restado en la monaĥejo tre plaĉis al ni. Nütschau, kvankam apud aŭtoŝoseo, estas trankvila loko kun puraj gasto-ĉambroj. Je nia dispono estis agrabla okangula kunvenejo, de ni ornamita per floroj kaj kandelo. Post mallonga piediro oni atingas la modernan kapelon kaj la vastan manĝosalonon, en kiu ni bonege manĝis.

En la ĉirkaŭaĵo estas parko kaj lago, en kiu naĝis anasoj. Ekstere brilis la suno, kaj ni vidis la aŭtunajn kolorojn de la foliaro. Unu tagon patro Willibald gvidis nin tra la malnova kaj nova klostro-partoj, en kiuj la monaĥoj vivas multe pli mallukse ol la gastoj.



Ankaŭ individue oni povas gastigi en Nütschau. Vidu la retejon <http://www.klosternuetschau.de>, aŭ skribu al frato Willibald Kuhnigk (Schlossstraße 26, 23843 Travenbrück).

**Gerda Dercks, Bernhard Eichkorn,  
Albrecht Kronenberger**



Ed Borsboom en Aalen (Fotis Inge Simon)

## FAME-premio al IEI

FAME-fondaĵo por stimuli la disvastigon de la Esperanto-kulturo, kun kiu la urbo Aalen en Germanio kunlaboras, transdonis 19 okt 2008 sian 11an Esperanto-premion al Internacia Esperanto-Instituto. La iniciato por tia distingo, aljuĝata ĉiun duan jaron, devenas de la mecenato, la esperantisto Franz Alois Meininger, kiu disponigis kapitalon. La komunumo Aalen ĉiam ebligas la festan ceremonion.

La ĉi-jara ceremonio okazis en la urba biblioteko de Aalen, konata pro la gastigo de la germana Esperanto-librokolekto. La urbestro bonvenigis ĉirkaŭ 80 gastojn, inter ili kelkajn lokajn politikistojn. Li emfazis la malfermecon de Aalen al la mondo kaj la gravecon de la Internacia Lingvo.

Herbert Mayer, la prezidanto de FAME-fondaĵo, skizis la historion de la haga institucio. La prezidanto de IEI, Ed Borsboom, prezentis la estraranojn, el kiuj tri ĉeestis, kaj informis pri la profesoreco de Wim Jansen por la Esperanto-katedro en la universitato de Amsterdam. Atilio Orellana Rojas, direktoro de la IEI-oficejo, sprite demonstris en provleciono la efikecon de la Ĉe-metodo.

Lastaj eroj de la solenaĵo konsistis el la enmanigo de la diplomo kaj ĉeko kun sekvaj dankvortoj de Borsboom. Tion li substrekiis per konvena donaco: la libro “Vivo de Andreo Cseh”, kiun li donis al la urbestro kaj al Karl Heinz Schaeffer, la organizanto el la Esperanto-rondo de Aalen. Muzikprezentado ornamis la omaĝon, en kies daŭro du junulinoj ludis pianon kaj violonon, per tio agrable alternante vortojn kaj muzikon. Dum la sekva bankedo ĉiu havis ŝancon pli persone interkonatiĝi.

**Els van Dijk**

## La Zamenhofa Jaro inaŭgurita

12–14 sep en la grandpollanda urbo Wağrowiec (inter Poznań kaj Gniezno) okazis ago-semajnfino dediĉita al inaŭguro de la venonta jubilea jaro de Ludoviko Zamenhof. Ĝin organizis Regiona Muzeo kaj Wağrowiec-a filio de la Poznań-a E-grupo *Esenco*, kiun loke estras Franciszek Witucki.

Vendrede en kelkaj urbaj lernejoj Stanisław Mandrak parolis pri lingvaj problemoj en la Eŭropa Unio (EU) por pli ol 400 lernantoj kaj instruistoj.

Vespere en la muzeo estis inaŭguritaj la Eŭropaj Tagoj de Heredaĵo (proklamitaj de EU) kaj la Zamenhofa Jubilea Jaro. La venintoj — inter kiuj starosto Michał Piechocki kaj urbestro Stanisław Wilczyński — aŭskultis la paroladojn de la direktorino de la muzeo Małgorzata Kranc, kaj de la prezidantino de *Esenco* Elżbieta Malik. Funkciis ekspozicio kun bildkartoj, libroj, medaloj, telefonkartoj kaj aliaj esperantaĵoj. En la vespera programo Zuzana Kornicka belege prezentis Esperantajn kantojn.

Sabate kaj dimanĉe estis preparitaj mini-kursetoj de Esperanto por intereseitoj.

Pri la evento skribis kelkaj gazetoj. *Radio Merkurs* aŭdigis intervjuon kun s-ro Witucki. La partoprenantoj substrekiis, ke en Wağrowiec neniam pli frue oni aŭdis tiel multe pri la internacia lingvo dum tiel malmulte da tempo.

**Elżbieta Malik**

## Gimnazianoj informas en Vieno

14 nov estis la Tago de la Malfermita Pordo en la viena gimnazio Diefenbachgasse 19. Ĉe la Esperanto-stando kvin lernantoj de la klaso 6A (*vd.* sube) informis la du centojn da vizitantoj pri la internacia lingvo. Ili disdonis Esperanto-kursojn kaj informilojn pri TEJO, UEA kaj Aŭstria Esperanto-Junularo. Ankaŭ vortaroj, jarlibroj de UEA kaj Pasportaj Servoj estis montritaj.

**Walter Klag**



## Unufraze

★ La ambasadoro de Finnlando en Nederlando, Mikko Jokela, akceptis 28 okt la Ĝeneralan Direktoron de UEA Osmo Buller por duhora interparolado, aparte pri la rolo de Eo kiel kultura pontolingvo. (GK UEA)

★ 8 nov Marta Cárdenas prelegis pri la projekto “Lingvolanĉilo” en la Konferenco de la Asocio de Instruistoj pri Fremdaj Lingvoj de Norda Kalifornio en Berkeley (USA); dum la konferenco funkciis E-budo. (Amikema)

★ 18 okt Seán Ó Riain prelegis pri Eo en la konferenco en la universitato de Galway (Irlando) al ĉ. 40 profesoroj pri la irlanda lingvo el diversaj irlandaj universitatoj, inkluzive de kelkaj el Norda Irlando. (*Eŭropa Bulteno*)

★ 7 okt okazis en Triesto (Italio) ronda tablo dediĉita al la Jaro de la Lingvoj, ĝin organizis Asocio de Triestaj Esperantistoj k aŭspiciis regiona komunumo (Provincia di Trieste) k Universita degli Studi di Trieste. (*Eŭropa Bulteno*)

★ En novembro komenciĝis E-kurso en la Universitato de Valladolid (Hispanio); instruas prof. Carlos García González; la kurso enhavas 30 instru-horojn. (Félix)

★ 9 nov en la *Rakonta vespero* en la teatro de Neŭŝatelo (Svislando) estis prezentita novelo de István Nemere el *Krokize de mia ĝardeno*: la E-originalon laŭtlegis Cesco Reale k la francan tradukon de Anne Marcanti legis la kantisto Olivier Tzaut. (HeKo)

★ E-floso kun granda surskribo *Esperanto* partoprenis flosad-feston *Touskiflot* en Paŭa Gavo (Francio). (*La Sago*)

★ 2 okt en Florenco (Italio) Leonardo Pampaloni prezentis Eon en kunveno de la Nacia Asocio de Instruistoj pri Fremdaj Lingvoj. (*Eŭropa Bulteno*)

★ 21-jara hispano Federico Faccio Peláz ekde 4 nov 2008 estas la volontulo por TEJO ĉe la Centra Oficejo en Roterdamo anstataŭ la antaŭa volontulino Julia Noe, kiu restas redaktoro de *TEJO-Aktuale*. (TEJO)

★ 15 nov 2008 la Asembleo de Hungaria E-Asocio elektis Imre Szabó kiel la novan prezidanton de HEA; la novaj estraranoj iĝis József Baksa, József Eszényi, Ferenc Harnyos, Andrea Horváth, Klára Mikola, Enikő Zengő Sereghymé. (HEA)

★ 1887 membroj de UEA registriĝis kiel uzantoj de la reta Jarlibro; plej multe el Francio (196 uzantoj), Usono (143), Germanio (137), Brazilo (114) k Japanio. (GK UEA)




Foto de Halina Gorecka

## “Evidente”: Esperanto praktikata

Dum kelkaj jaroj Jacques Tuinder, prezidanto de la fondaĵo *Evidente*, korespondis kun blinda kaliningrada esperantistino Ludmila Plungina. Multfoje ŝi sendis al Nederlando receptojn por okulvitroj, kiujn bezonas neriĉaj malbonvidantoj. Laŭ siaj eblecoj *Evidente* mendis la bezonatajn okulvitrojn kaj senpage havigis ilin.

*Evidente* strebas sendi fakulojn al neriĉaj landoj. Ĉi-novembre ili venis al Kaliningrado por esplori vidkapablon kaj elekti taŭgajn lensojn kaj muntumojn por la plej malriĉaj homoj. La socia organizaĵo “Defendo de rajtoj kaj antaŭenigo de intereso de handikapitoj” zorgis pri la surloka realigado helpe de la regiona sociala ministerio. Esperanto servis kiel kontakt-lingvo.

450 personoj ricevis helpon de du spertaj oftalmologoj. Dum tri tagoj la teamo laboris en la ejo de Blindula asocio en Kaliningrado, dum la cetera tempo en maljunulejoj kaj en lernejoj por infanoj kun san- kaj vid-problemoj.

Unu vesperon Jacques Tuinder pasigis en agrabla kunveno kun kaliningradaj esperantistoj. Li rakontis pri siaj infanaĝaj impresoj, familio, profesiaj okupoj, sed pleje pri la agado de *Evidente*, precipe en afrikaj landoj. Donacojn ricevis kaj la gasto, kaj la gastigantoj.

Kelkaj kaliningradaj amaskomunikiloj interesiĝis pri la misio kaj intervjuis Jacques Tuinder kaj la organizantojn.

**Halina Gorecka**



## Ĉirkaŭ la mondo dum naŭ horoj

La tria ĉiujara Moskva lingva festivalo okazis 26 okt en la fremdlingva instituto de la Moskva urba pedagogia universitato, kies laborantoj bonvoleme helpis konatigi partoprenantojn kun lingva kaj kultura diverseco de la mondo.

La festivalejo estis tre taŭga: vasta, hela, komforta, en la centro de la urbo, apud metrostacio. En la lekcioj estis modernaj teknikaj helpoj al prezentantoj. La salonon, kie okazis la malfermo kaj fermo de la festivalo, ornamis grandaj afiŝoj kun la vortoj: “La devizoj de UNESCO: por lingva diverseco; por pureco de la gepatra lingvo; por lingva klerigado dum la tuta vivo” kaj “Esperanto estas la dua lingvo post la gepatra, kaj komuna lingvo por ĉiuj”.

Laŭ la informo de la organizantoj (Moskva junulara esperanto-klubo MASI) la festivalon vizitis ĉirkaŭ 700 lingvemuloj, precipe junaj, por kiuj estis prezentataj pli ol 50 diversaj lingvoj en ok duonhoraj lecionoj. Samtempe okazis multaj prelegoj, inter kiuj ankaŭ pri Esperanto, bone vizitataj de la partoprenantoj. Krom lingvoprezentadoj, oni povis viziti kelkajn “lingvajn teritoriojn”, kie estis permesita parolado nur en difinitaj lingvoj.

La prezentantoj estis denaskaj parolantoj, kiuj bone posedas la rusan por rakonti pri sia lingvo, lingvoinstruistoj kaj entuziasmuloj de la lingvolernado.

Ĉie — en la manĝejo, salonoj, koridoroj, ŝtuparejoj, apud la librovendaj tabloj... — ofte aŭdiĝis interparoladoj en Esperanto, kaj ĉiuj vizitantoj povis rimarki ilin.

**Maksim Griŝin**

## Ĉielarko de lingvoj

11 okt en Odessa (Ukrainio) okazis Lingva Festivalo *Ĉielarko de lingvoj*, dediĉita al la Jaro de Lingvoj 2008, Eŭropa Lingva Tago (26 sep) kaj Ago-Tago (4 okt). Organizis kaj gvidis ĝin Odesa junulara E-klubo *Verdaĵo*.

Ĉi tiu festivalo estis jam la kvara: antaŭe ili okazis en 2001, 2003 kaj 2006. Ĉi-jare ĝin partoprenis kelkcent personoj, kiuj aŭskultis prezentadojn de la lingvoj azerbajĝana, araba, belorusa, bulgara, ĉina, Esperanto, germana, greka, hindia, itala, korea, kurda, latina, malaja, persa, pola, rusa, vjetnama.

**Tatjana Auderskaja**

**Sur la foto:** en lingvaj festivaloj oni ne nur lernas lingvojn, sed ankaŭ trovas amikojn.



## Eŭropa Komisiono financas studadon pri “vehikla” lingvo

*de Dafydd ab Iago el Bruselo*

Preskaŭ ne eblas por unuopuloj superrigardi centojn da diversaj alvokoj, kiujn la Eŭropa Komisiono (EK) publikigas ĉiumonate. Kadre de la sepa esplor-programo por 2007–2013 EK publikigas alvokon al studado de la lingvo-problemo en Eŭropo.

Ĝis 13 jan 2009 oni povas sendi proponojn kiel elspezi maksimume € 2,7 mln por esplori la temon “Vehiklaj lingvoj en Eŭropo en la periodo de tutmondiĝo: historio, politiko, praktiko”. La kondiĉo de EK estas, ke la projektojn kunproponu almenaŭ tri sendependaj organizoj el la ŝtatoj de la Eŭropa Unio (EU).

Laŭ Ĵeromo Vaŝe la kondiĉoj por kandidatiĝo ne permesas multe da esplorado pri Esperanto. “Laŭ la titolo, ĉiuokaze la lingvo internacia povus esti nur eta parto de la esplorata kampo. Se entute la plenumantoj atentos ĝin, tio estos granda atingo ene de malgranda kaj malmulte atentata dokumento inter miloj da similaj dokumentoj”, — rimarkas la franco. Li ankaŭ notas en la retforumo de *Libera Folio* la grandan laboron bezonatan por kandidatiĝo pro la formalajoj, kiuj postulas, ke proponanto konsistu el almenaŭ tri jure sendependaj organizoj.

“Ĉi tiu alvoko ŝajnas defio al esperantistaj spertuloj, por ke ili organizu sin kaj montru la efikon de Esperanto”, — opinias José Manuel Gaspar Martins, portugala profesoro kaj membro de esperantista Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo. “Post tiom da malagrablaj spertoj pri EU kaj Esperanto, ĝi povas esti provo ĉu montri akcepton por klarigi la eblecojn de Esperanto, ĉu montri ke la esperantistoj eĉ ne sukcesus organizi tian proponon”. Gaspar Martins pretas kunlabori — el la socia-ekonomika vidpunkto — pri propono. Sed li bezonus spertulon pri lingvistiko aŭ por gvidi la proponon.

Ankaŭ ne promesodona estas la ĝisnuna sinteno de la Komisiono pri la angla. Plej freŝan ekzemplon donis la laborgrupo, kunmetita de Leonard Orban, kiu respondecas en EK pri multlingvismo (*LOdE*, 2008, №4). La *Proponoj de la Grupo de intelektuloj por interkultura dialogo*, publikigitaj en septembro 2008, diras ke la elekto de lerninda(j) lingvo(j) estas “persona afero”. Ĉi tiu grupo, gvidata de Amin Maalouf, libana aŭtoro kaj franca ŝtatano, proponis, unue, lingvon de komunikado laŭ la nivelo de “internacieco” kaj, due, lingvon persone adoptitan.

Ankaŭ Orban, en gazetara konferenco, substreki ke EK ne povas doni “internacian statuson” al iu lingvo, ĉar en EU nur ŝtatoj-membroj havas la plenan kompetenton organizi siajn edukistemojn. Tamen en la situacio, kie ĉiu lingvo-komunumo batalas kontraŭ la aliaj, Orban evidente ne mencias, ke la angla pli kaj pli gajnas.

En la nuna alvoko de EK pri studado de vehiklaj lingvoj en Eŭropo oni povas vidi ankaŭ la deziron plifortigi la konojn kaj argumentojn pri la lingva aspekto de la tutmondiĝo. La politiko de EK ekde 2002 nur proponas, ke ĉiu EU-civitano eklernu du lingvojn. Komprenible tio ankaŭ reprezentas bonan kompromison inter Francio, Germanio kaj Hispanio — kaj diversgrade Italio — pri la merkato por lingva studado. Sed neniu povas konkurenci kun Anglio, kiu enpoŝigas pli ol 15 miliardojn da eŭroj jare danke al la vendado de sia lingvo al fremduloj.



Laŭ la franca-libana aŭtoro Amin Maalouf ni devas “persone” elekti lingvon surbaze de ĝia internacieco kaj niaj propraj ideoj. (Foto de la Aŭdvida departemento de EK)

### Pri Esperanto en perspektivo

Kun granda intereso mi legis la artikolon de Andreas Künzli pri *Esperanto en perspektivo* en la serio *Nia trezoro*.

La aŭtoro menciis multajn recenzojn, aperintajn en diversaj revuoj. Mi deziras aldoni, ke recenzon publikigis ankaŭ la plurlingva revuo *Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado* (pli poste publikigata sub la anglalingva titolo *Language Problems and Language Planning*), vol. 3 №1 (7), 1979, p. 40-44.

Eble tiu recenzo malpli gravas, ol aliaj, ĉar ĝi estas francalingva. Mi ne intencas substreki ĝian ekziston tial, ke mi ĝin aŭtoris. Sed ĝi prezentas sendube historian intereson pro la furioza reago de Ivo Lapenna, kiu protestis jene: “En mia tre longa universitata kariero mi neniam legis tian neobjektivan recenzon, plenan de eraroj bazitaj sur antaŭjuĝoj”. Ĉar tio ne sufiĉis, la retoriko-majstro aldonis, ke mia recenzo “estas fakte senprecedenca ne nur en la Esperanto[-]Movado, sed ankaŭ en la mondo de kulturo ĝenerale”. Ne malpli! Mi do ekĝuis tutmondan famon danke al la bone konata scienca objektiveco de la Hamburga misheroo.

Kiuj legas la francan lingvon, tiuj povas akiri propran opinion, precipe post komparo kun la artikoloj de dek unu diversaj recenzintoj, tiam legeblaj en la revuoj *Esperanto* kaj *Heroldo de Esperanto* kaj kun la aliaj, menciitaj de A. Künzli, en kiuj troviĝis multaj kritikoj. Kial Lapenna elektis ĝuste min por elverŝi sian galon, restas por mi plena mistero.

**Michel Duc Goninaz**

### Fervojistoj donas ekzemplon

FISAIC (Internacia Federacio de Artaj kaj Intelektaj Asocioj de Fervojistoj) uzas du laborlingvojn: la francan (ĉar la sidejo estas en Francio) kaj Esperanton.

La sekretario de FISAIC, Georges Wallerand, skribis en la unua (septembra) bulteno de FISAIC:

“Sendube vi estos surprizitaj pro la fakto ke tiu dokumento estas skribita en du lingvoj: la franca kaj Esperanto. Estas elekto kiu ankaŭ lokiĝas sur la kampo de la kontraŭstaro, kontraŭstaro al kiu ajn hegemonia nacia lingvo volanta sin imponi kiel universala lingvo. Estas riĉeco de la membrolandoj de FISAIC, ke ĉiu el ili disponas esperantistan grupon kapablan traduki tiun dokumenton en la lingvon de sia propra lando. Krome, pensu ke por kontentigi ĉiun el niaj sektoroj, ni estus devigitaj traduki FISAIC-info(n) en dudekon da lingvoj ... kaj ankoraŭ, kia estus la kvalito de la traduko?”

**Leopold Patek**



Se vi volas, ke ankaŭ viaj infanoj gaje pasigu unu semajnon en internacia amikaro, sed sen lingvaj baroj, partoprenigu ilin en IIK.

## IIK: pli komplika ol infanferiejo

Estinte infano, ĉu vi somerumis en “normala” infanferiejo? Tiu estas bone organizata, ĉar okazas ĉiam en la sama, taŭge konstruita ejo, kun infanoj el la samaj lingvo kaj lando en samaĝaj grupoj, kun junaj gvidantoj spertaj, trejnitaĵ.

Kaj kiom [mal]facilas Internacia InfanKongreseto? IIK okazas ĉiujare en alia lando, la UK-lando, kies lingvon kaj kutimojn ne ĉiam konas la organizantoj. Ĝiaj partoprenantoj venas el dekkvino da landoj kaj lingvoj, sciantaj Esperanton foje flue, foje balbute. Ĝiaj gvidantoj ofte estas gepatroj de partoprenantaj infanoj aŭ Esperanto-instruistoj el lerneja klaso sen aparta sperto gvidi kaj ludigi kvardekon da tiaj infanoj. IIK ŝajnas tasko multe pli komplika, sed precipe estas multe pli riĉiga kaj aventureca ol “normala” infanferiejo.

En IIK oni faras tiujn programerojn, por kiuj ion disponas la ejo kaj ĉirkaŭaĵo, pri kiuj spertas kaj pretas la gvidantoj, kiujn deziras la infanoj. La eduka celo en IIK estas uzi nian lingvon plej ofte por malhelpi krokodiladon, sed la infanoj trovu tiujn programerojn amuzaj, ludecaj.

IIK serĉas novajn gvidantojn kaj kompreneble multajn infanojn el familioj aŭ klasoj. Legu en <http://bertosch.free.fr/iik2009/> aŭ skribu al IIK-komisiito [bert.schumann@gmail.com](mailto:bert.schumann@gmail.com)

**Bert Schumann**

## Du grandaj artikoloj

**Israelo.** En la plej granda gazeto de Modiin, aperanta en la eldonkvanto ĉ. 120 mil ekz (nun pli multe pro la municipaj elektoj) 6 nov aperis du-paĝa intervjuo kun Amri Wandel. Kvankam la ĉefa temo estas lia scienca laboro, kiel asertas la titolo *Vivo, la Universo kaj ĉio cetera* la intervjuo longe kaj favore prezentas Esperanton, kun foto de Amri kun ties libro *La Kosmo kaj Ni*. **A.W.**

**Hungario.** Aperis dupaĝa artikolo pri Esperanto en la populara hungara magazino *Sikk* (= Ŝike).

Sub la okulfrapa titolo *La tria plej populara lingvo inter la studentoj estas Esperanto!* surbaze de intervjuo kun László Szilvási ĝi allogas prezentas la fenomenon Esperanto. Citante opinion ankaŭ de du aliaj esperantistoj Rózsa Antónia kaj Horváth József, la redaktoro prezentas pozitive la lingvon kaj ties uz-eblojn.

La artikolo estas ilustrita per grandaj fotoj, faritaj en la nova Budapeŝta Esperanto-Lernejo de *Lingvo-Studio*, gvidata de Szilvási. (Vidu la dekstran bildon.) **Varga Tibor**

## Ukrainio: por pli da inform-sekureco

Laŭ la kieva inform-agentejo *Novyj Region*, Ukrainio kontraŭstaras enportadon de presaĵoj el Ruslando kaj Bjelorusio.

La 12an de novembro pri tio skribis en la ukraina tagjurnalo *Denj* (Tago) direktoro de la ŝtata amaskomunikila departemento Bohdan Ĉervak.

Laŭ li temas pri kultura ekspansio, ĉar la ukrainian libromerkaton 90-procente plenigas libroj el Ruslando kaj Bjelorusio, kaj en la orientaj kaj sudaj regionoj de Ukrainio ukrainlingvaj presaĵoj preskaŭ forestas. Tio malhelpas al la funkciado de la ŝtataj kaj justicaj organoj, de la lernejoj, de la medicinaj, sciencaj, kulturaj kaj socialaj instancoj.

«La libro estas ne nur grava apartenaĵo de la nacia kulturo kaj de la popola spirito, ĝi estas ankaŭ grava faktoro, influanta la stacion de la nacia inform-sekureco, same kiel radio, televido, gazetaro kaj interreto», — asertis la departementestro, kaj atentigis, ke en Ukrainion devas ne penetri kontraŭukrainaj presaĵoj el Ruslando.

«La batalon por la ukraina libro oni povas gajni nur ĉe komunaj koordinataj agoj de ĉiuj ŝtataj organoj, ankaŭ de tiuj, de kiuj dependas la ŝtata inform-sekureco: Ŝtata Doganservo, Ŝtata Impostadministracio, Ŝtata Limgardista Servo, Ukraina Sekurecservo k. a.», — konkludas Bohdan Ĉervak.

«Sed *La Ondo de Esperanto* pro eventuala malpermeso enlasi en Ukrainion presaĵojn el Ruslando ne havos damaĝon kompareblan kun la malpermeso enlasi en Ruslandon *La Esperantiston* en la jaro 1895», — komentas Halina Gorecka, la eldonanto de *La Ondo*, ĉar ĉi tiu internacia magazino havas nur ... du abonantojn en Ukrainio. — «Kaj al ili ni jam longe sendas la revuon el Pollando», — ŝi aldonas kun rideto.

**Ibrahim Bryzgalov**

## Bonvolu korekti

La redakcia koboldo lasis kelkajn spurojn en la 169a *Ondo*. Multaj rimarkis, ke sur la kovrilpaĝo estas indikita “oktobro” anstataŭ “novembro”, kaj kelkaj sprite komentis, ke tio ne estas mirinda en la lando, kie oni festas la Oktobran Revolucion en novembro.

Tobiasz Kaźmierski atentigis, ke li sendis al la redakcio la foton pri *La Perdita Generacio* en ARKONES (pĝ. 4), sen mencii, ke la foton faris ne li, sed Ivo Miesen.

Reinhard Fössmeier skribis, ke en la artikolo pri la sesio de AIS en Banjaluko (pĝ. 8) li erare raportis, ke s-ino Komarnicka magistriĝis. Reale, ŝi bakalaŭriĝis.

Bonvolu korekti en viaj ekzempleroj.

**La red.**





Hazarde estis muzika paŭzo, kiam ĵurnalistino de *AnzeigenKurier* venis al la studio de *Radiotreff 88.0* por verki artikolon pri la Esperanto-redakcio de ĉi tiu radio.

Same hazarde tiumomente mi tenis en la manoj vian ĉarman revuon *La Ondo de Esperanto*, el kiu mi volis citi diversajn tekstojn por la radioprogramo. Kaj do la artikolon, kiu aperis 15 okt 2008, garnis kolorfoto en kiu bone videblas via revuo.

La gazet-artikolo informas pri Esperanto kaj pri nia redakta grupeto, kiu agas jam dum 12 jaroj ĉe tiu loka radio. Ni parolas germane, sed la muziko estas Esperanta. Unu el la du ĉiumonataj elsendoj estas pri la Esperanto-movado en nia grupo, lando, kaj en la mondo, la dua elsendo havas iun temon, kompreneble ankaŭ pri Esperanto. La elsendoj oni ripetas, kaj do ĉiusemajne okazadas unuhora elsendo.

Ni laboras tute memstare: teknike, redakte, parole, kontrolo fakte ne okazas. Ĝis nun neniu aŭskultanto plendis, kvankam ni ofte kaj akre kritikis, prilumas la sintenon de Germanio (de la registaro ĝis ĉiu civitano), ekzemple, je la stranga lingvopolitiko en EU, kiu ja estas tute antigermana favore al la usona lingvo.

Neniam al ni mankas temoj aŭ ideoj, ni ankaŭ ne permesas al ni kaj niaj gastoj skribi preparitajn parolojn por legi. Tio aspektas teda kaj terure enua, nur estu flua parolo kaj spontanaj respondoj. Sed vi mem ja ĉion bone praktikas ĉe vi.

La programo *Ondo Esperanto* aŭskulteblas ankaŭ rete: [www.ondo-esperanto.de](http://www.ondo-esperanto.de).

Verner Pfennig

## Anoncetoj

Korespondi deziras Jerzy Słuszniak

✉ Ul. E. Orzeszkowej 42 m 8, PL 50-311 Wrocław, Pollando

Eldona Societo *Esperanto* planas eldoni novelaron kun noveloj verkitaj en 2000–2009. Ni invitas ĉiujn verkemulojn sendi novelojn prefere retpoŝte al [esperanto@globalnet.net](mailto:esperanto@globalnet.net) aŭ papere al Leif Nordenstorm, Järnvägsgränd 11, SE-961 76 Boden, Svedio. Ni ne resendos manuskriptojn.

Limdato: la 1a de aprilo 2009.

19 okt 2008 forpasis

### Bernard Golden (1925–2008)

naskiĝinte en Usono li iĝis arkeologo kaj laboris en pluraj landoj, ĝis post la edziĝo en 1971 ekloĝis en Hungario. Esperantisto ekde 1946 li verkis ĉ. 1800 diverstemajn artikolojn por multaj E-gazetoj kaj ses librojn: *Hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ* (1982), *Bestoj kaj homoj* (1986), *Sango, sekso kaj scienco* (1993), *Infero en aŭtuno* (1993), *Ŝamanoj en la kosmo* (1994), *Antaŭ la kulisoj* (1994). Dum la lastaj dek jaroj ne plu verkis en Esperanto.

26 okt 2008 post longa grava malsano forpasis

### d-ro Josef Hradil (1924–2008)

kuracisto, multjara motoro de la movado en Mnichovo Hradiště, fondinto kaj longe gvidanto de iama medicinista sekcio de ĈEA, redaktoro de *Verda Familio*, *Medicinistaj Informoj* kaj *Sano*, aktivulo de UMEA, honora membro de ĈEA, aŭtoro de ĉeĥlingva broŝuro pri Esperanto por medicinistoj (1969) kaj de *Esperanta medicina terminaro* (1979 k.a.).



## Lernu! sesjariĝas

E@I prezentas...

La 21an de decembro 2008 okazos la sesa datreveno de *lernu!* (<http://lernu.net>) — la plej granda kaj longdaŭra projekto de E@I (Edukado@Interreto). Kvankam inter esperantistoj apenaŭ restis personoj, kiuj ne aŭdis pri tiu ĉi projekto, ni klarigu, ke temas pri senpaga multlingva paĝaro por lernado de Esperanto. La paĝaron finance subtenas Esperantic Studies Foundation.

Dum ses jaroj la paĝaro konstante kreskis kaj pliboniĝis. Nun en ĝi estas amaso de diversspeca materialo por lernado. Oni povas trovi diversnivelajn kursojn, ekzercojn, vortarojn, ludojn. Ankaŭ ĉe *lernu!* estas multe da tekstoj por legado kaj sonoj por tiuj, kiuj ŝatas lerni “per oreloj”. Ĉiu esperantisto povas trovi ion utilan por si. Komencantoj povas lerni ekde la nulo kaj tiuj, kiuj jam scias Esperanton, povas pliprofundigi siajn sciojn de la lingvo.

Eĉ tiuj, kiuj perfekte scias la lingvon, povas utiligi *lernu!* por komunikado. Por tiu celo ĉe *lernu!* troviĝas babilejo, multlingvaj forumoj, mesaĝ-sistemo, bildokartoj kaj multaj aliaj aferoj. Ĉiuj estas bonvenaj utiligi tiujn ĉi ilojn.

Jen kelkaj interesaj statistikaj informoj pri *lernu!*:

- ♦ ĝi ekzistas en 34 lingvoj;
- ♦ ĝi havas 57 lingvohelpantojn kaj 192 tradukantojn kaj multegajn helpantojn, kiuj iamaniere kontribuis al la paĝaro;
- ♦ ĝi havas pli ol 61 500 registritajn uzantojn;
- ♦ ĉiumonate ĝin vizitas ĉ. 150 mil vizitantoj;
- ♦ kutime ĉe la paĝaro troviĝas pli ol 100 samtempaj retuzantoj.

Spertaj esperantistoj ĉiam estas bonvenaj helpi al la projekto. Ĉe la paĝaro konstante estas bezonataj spertaj kaj laboremaj helpantoj. Necesas teni la paĝaron ĝisdata en multaj lingvoj, respondi multajn komentojn, respondi kaj korekti mesaĝojn de lernantoj. Pli da informoj pri tio, kiel eblas kontribui al *lernu!*, eblas trovi ĉe la paĝo: [http://lernu.net/pri\\_lernu/subteno](http://lernu.net/pri_lernu/subteno).

Neringa Gaus

## Avo Frosto respondas en Esperanto!

Kristnasko baldaŭ alvenos, kaj pluraj centmiloj da infanoj el la tuta mondo skribos al Avo Frosto. Jam delonge, Avo Frosto kutimas respondi en la franca, la angla kaj en dudeko da aliaj lingvoj. Ekde 2002, la norda saĝulo ankaŭ lernis Esperanton.

Ni invitas ĉiujn esperantistojn, junajn kaj junkorajn, malkovri tiun tradicion, skribante al Avo Frosto:

Avo Frosto  
Norda Poluso  
Kanado, Canada  
HOH OHO



Avo Frosto preferas manskribitajn leterojn, eĉ se skribitaj de etaj manoj kiuj lernas skribi. La poŝta kodo estas vera kaj grava parto de la adreso. Ĝi estas rezervita al Avo Frosto.

Ne forgesu klare skribi vian nomon kaj adreson por certigi ricevon de respondo. Krome, indiku klare, ke la letero estas en Esperanto, ĉar la helpantaj koboldoj ne ĉiam rekonas pri kiu lingvo temas.

Normando Fleury  
koboldo por la Kanada Poŝta servo

# Manĝi marmeladon sur fotelo ne estas facile aŭ: pri kelkaj problemoj de semantika strukturado

de Michel Duc Goninaz

## Enkonduke: Karakterizaĵoj de la esperantlingva leksiko

Kiel en ĉiu ajn leksiko, la morfemoj de Esperanto estas arbitraj. Arbitraj estas ankaŭ ilia nombro kaj iliaj interrilatoj. La bildigo de la eksterlingva mondo estas organizita diverse laŭ la lingvoj, sed en neniu ĝi estas strukturita sistemece laŭ la principo de la sciencaj nomenklaturaj. La leksikaj unuoj prezentas do interpretojn de la socia sperto en “semantikaj kampoj”, loze organizitaj. Unu leksika unuo povas aparteni al pluraj tiaj kampoj. Ekz-e *domo* apartenas al la aro “loĝejoj” en la serio “*domo, palaco, kabano, barako...*”, al la aro “ejoj por diversaj funkcioj” en la serio “*domo, kastelo, preĝejo, magazeno...*”. La sola rimedo por iom strukturi la leksikon estas la eltrovo de signiferoj submorfemaj, kiuj povas informi pri la diferencoj inter samkampaj terminoj.

Tio ne signifas, ke tia analizo ĉiam sukcesas. Laŭ atestoj de akademianoj, “estas nemal multe da vortoj kiel *kekso, biskvito, vermiĉelo* ktp, kies senco tre malsimilas en diversaj partoj de Esperantujo”. “X kaj mi lastatempe partoprenis diskuton pri tio, kio estas *marmelado* por anglo, germano kaj ruso, kaj en la fino oni devis helpi sin per bildoj por kompreni, pri kio oni parolas”. La sola malĝustaĵo en tiu rimarko estas, ke la diferencoj ne dependas nepre de la nacieco, eĉ ne de la nacia lingvo. Ene de la sama lingvo ekzistas tiaj diverĝoj, do nemirinde, se ankaŭ en Esperanto: por Parizano *écurie* entenas nur ĉevalojn, por Savojano ĝi entenas precipe bovinojn. Konataj estas la sencodiferencoj inter la samaj anglalingvaj vortoj en diversaj partoj de Anglalingvio<sup>1</sup>. Sed ni konfesu, ke la malsamaj interpretoj de *marmelado* malpli gravas, ol tiuj de *libereco*.

## Ĉu la “skemismo” de Esperanto povas helpi en la klopodo pri strukturado?

La skemismo de Esperanto, ofte emfazata de la propagandistoj, signifas nur, ke por iuj vortoserioj nia lingvo imitis kaj plivastigis regulaĵojn, ekzistantajn en iuj aliaj lingvoj. Tiu skemismo evidentiĝas per la vasta uzado de derivaĵoj kaj kunmetaĵoj. Sed tio ne signifas, ke la kunmetitaj elementoj liveras la sencon de kunmetaĵo, kiu estas

ĉiam arbitra kaj konvencia. Zamenhof kaj la postaj gramatikistoj rimarkigis kaj akceptis, ke ne ĉiuj kunmetaĵoj estas “logikaj”, ke iuj povas esti nomataj “idiotismoj” aŭ “esperantismoj”: J. Wells<sup>2</sup> donas la ekzemplojn de *kamparo, vortaro, vagonaro*, sed al la listo povas aparteni *registaro, fervojo, terpomo, voĉdono, necesejo, amindumi, neforgesumino*, kaj ĝi povas esti eĉ pli longa, ĉar la plej uzataj kunmetaĵoj estas fakte novaj leksikaj unuoj, kies sencon oni devas lerni, kaj por kiuj multaj lingvoj havas apartajn radikojn, ekz-e *lernejo, preĝejo, tranĉilo* k.a. Kiel prave rimarkigis Edmond Privat<sup>3</sup>, “kiam oni diras *mirinda* oni ne pensas pri *miri*”.

La skemismo estis oportuna por la aŭtoro de la unua leksiko de Esperanto<sup>4</sup> kaj restas tia ĝis certa grado por la lingvouzantoj, kiam temas pri serioj, kiuj en etnaj lingvoj prezentas elementojn de reguleco: ad-vortoj por agoj, in- kaj id-vortoj por bestoj, ist-vortoj por profesiuloj, mal-vortoj k.a., sed eĉ por tiuj aroj oni ne parolu pri “logiko”, ĉar ĉiam enestas konvencio, “silenta interkonsento” pri la atribuita senco: *ist* ne esprimas la samajn rilatojn en *fizikisto, pianisto, dentisto*; same *in* ne esprimas la samajn rilatojn en *virino, katino, fratino*.

Oni rajtas diri, ke la kunmetaĵoj de Esperanto estas pravigeblaj, ĉar ili samvaloras, kiel simplaj radikoj en iuj aliaj lingvoj (*lernejo* = école, Schule, iskola k.a.) aŭ en Esperanto mem: *voĉdono* = baloti, *neforgesumino* = mizoto. Leksikografo donos pri *mizoto* difinon pli-malpli precizan (“genro el boragaĵoj, kun skorpioidaj cumoj el radformaj floroj”) dum simpla lingvouzanto eble diros: “ĝi estas floro”. Sed *neforgesumino*, kun 5 morfemoj anstataŭ 1 (se ne kalkuli la komunan -o), ne donas pliajn

En la Akademia diskuto oni provis solvi la problemon *brakseĝo* (maldekstre) / *fotelo* (dekstre) per bildaj argumentoj.



Lingvo

informojn. Ĝia sola, tamen grava, pravigo estas ĝia metaforeco kaj poezieco.

Objetebblas, ke multaj kunmetaĵoj estas senpere analizeblaj: *manĝoĉambro* probable ne bezonas difinon, diference de *salono*. Sed *preĝejo* ja bezonas difinon, same kiel *templo*, kaj *terpomo*, kiu ja ne estas pomo, bezonas difinon, same kiel *pomo* aŭ *batato*. *Fingringo* restos misteraĵo por iu, kiu nenion scias pri la mankudrado — kaj la francalingva *dé* estas multe pli simpla. *Ferindustrilaboristino* estas rapide deĉifrebla malgraŭ sia komplekseco. Sed *naftokrizo* estas komprenebla, nur se oni akiris informojn pri la reala situacio, aludata per la vorto *krizo*.

La arbitreco de la leksiko klarigas, ke vortoj apartenantaj al samaj semantikaj kampoj ne havas la saman strukturon, kaj tiu konstato ne bezonas la apogon de iu teorio pri laŭdira “gramatika” karaktero de la “radikoj”: la gurdato paro *broso/kombilo*, la multaj paroj, kiaj *salono/kuirejo, advokato/juĝisto*, neniel povas pravigi “gramatikan” pritrakton de tiu fenomeno, precipe se oni ekzamenas parojn, kiaj *virtuozo/muzikisto, emerito/pensiulo, tajloro/ŝuisto, ruso/usonano, Usono/Rusujo*, en kiuj la teorio pri la “gramatika karaktero” neniel povas aplikigi.

## Kerne: Kio estas seĝo?

C. Piron<sup>5</sup> asertis, ke fotelo estas speco de seĝo, kio subkomprenigas, ke la termino *fotelo* eble senutilas, ĉar *brakseĝo* aŭ *apogseĝo* povas sufiĉi – al kio Waringhien rebatis<sup>6</sup>, ke *seĝo* respondas al la francalingva *chaise* ne al *siège*: ambaŭ fotelo kaj seĝo estas do subspicoj de sidiloj. La problemo, naskiĝinta pro la nekoheraj nacilingvaj tradukoj de la *Universala Vortaro* de la Fundamento, plu daŭras: dum nelga diskuto ene de la sekcio pri la ĝenerala vortaro de la Akademio, aŭdiĝis eĉ la propono “maloficialigi” la vorton *fotelo*, uzatan de unu jarcento kaj oficialigitan en la 8-a Oficiala Aldono antaŭ pli ol tridek jaroj. *Fotelo* troviĝis en la vortaroj de Verax (1910), Boirac (1909), Wüster (1923), ĉar ĝi estis uzata de Kabe en la traduko de *La Faraono* (1907). Malfacilas ĉi-foje kulpigi la francojn, ke ili kreas neologismojn, aldonante -o al francalingvaj vortoj: la franca formo *fauteuil*, de ĝermana deveno, certe kontribuis al



la internaciigo de tiu termino, sed Kabe evidente prenis la esperantlingvan *fotelo* el la pola lingvo (oni devas logike konjekteti, ke li ne prenis ĝin el la hungara, kvankam la rezulto estus sama!). Ignorblas la anti-fotela interveno, kiel avatara de la anti-neologisma fanatikeco. Sed la starigitan problemon oni ne povas forĵongli, ĉar kelkaj argumentoj, uzataj dum tiu diskuto, rivelis, ke akademianoj ne havas la saman koncepton pri tiel simpla objekto. Jen ili kun miaj komentoj:

*Tiuj, kiuj parolas pri "fotelo" kaj supozas, ke ĉiuj esperantistoj kaptas la diferencon inter tiu nocio kaj "brakseĝo", eraras en sia supozo. Bonvolu ne trudi al ni ĉiujn diferencon, kiun perceptas nur kelkaj.*

Sed uzi vorton, kiun eble ne ĉiuj uzas, ne signifas "trudi" ĝin al aliaj.

*"fotelo" n mi neniam uzas. Aliflanke, "seĝo" por mi estas supernocio, ankaŭ tabureto por mi estas speco de seĝo, samkiel la seĝoj en aŭto aŭ aŭtobuso.*

Por tiu kolego, seĝo estas ia ajn sidilo. Tio ŝajne ne kongruas kun la plej kutima uzado de tiu termino.

*Por mi franco, la diferenco inter "fotelo" kaj "brakseĝo" tute ne estas klara <...>. La ofico de franca Akademiano nomiĝas "fotelo", sed en la Akademio de Esperanto oni eĉ ne havas brakseĝojn...*

Evidente la franca lingvo havas nur unu vorton por fotelo kaj brakseĝo. Sed Esperanto ne estas la franca lingvo. Koncerne la Akademion, R. Schwartz estis certe influata de la prestiĝa nuanco de la vorto *fotelo*, kiam li skribis:

*Pli bone estas diri stultajojn, kiel mi, ol ronki sur fotelo de la Akademi'.*

*En la itala estas tute klara distingo inter la simpla "sedia a braccioli" (brakseĝo) kaj "poltrona" (fotelo). Mi ne vidas kaŭzon forsarki unu el la du terminoj, kiuj nur laŭ unu eco koincidas: la fakto ke oni povas apogi la brakojn. Abunda nombro da aliaj kvalitoj (ŝtofa remburto, sidkomforto, eventualaj flankaj vandoj de la sido ĝis la brakapogilo, prezo ĉe teatro, ktp) malkoincidas, kaj tio pravigas la ekziston kaj cetere jam abundan sendamaĝan kaj senĝenan uzadon de la du malsamaj terminoj.*

Esperanto ankaŭ ne estas la itala lingvo, sed la konstato, ke ambaŭ lingvoj prezentas la saman diferencon inter brakseĝo kaj fotelo, estas tute ĝusta.

*Plej verŝajne la komenca signifo de*

*"brakseĝo" kovris pli vastan semantikan kampon; ĉe la apero de "fotelo" kiu okupis sian pli malvastan kampon, la signifo de brakseĝo laŭgrade restriktiĝis al tiu parto de la komenca kampo ne kovrita de "fotelo".*

Tio estas tute ĝusta analizo, aplikebla al la tuta semantika sistemo. Kiam aperas nova termino, tio ŝanĝas la semantikajn limojn de tiuj, kiuj apartenas al la sama kampo.

*Certe la NPIV-difino de "fotelo" kiel simpla senplua-vorta sinonimo de "brakseĝo" neglektas nuncojn kiujn verŝajne tamen multaj uzantoj sentas; do oportunus formuli pli bone tiun difinon, anstataŭ forsarki la terminon.*

Tiu ĉi rimarko tute ĝustas, kaj mi volonte faras memkritikon. Dum la reviziado de PIV, mi malprave neglektis la diferencon inter fotelo kaj brakseĝo. Tamen la Akademio jam donis tute prudente en la 8-a Oficiala Aldono (1975) ĉiujn necesajn detalojn por kompreni la semantikan enhavon de *fotelo*:

**fotel-o.** Komforta kaj sufiĉe ampleksa sidilo, kun brak- kaj dors-apogiloj, por unu persono. (Ordinare, la fotelo estas malalta kaj ĉiuflanke kusene remburita, dum la brakseĝo, pli malpeza, havas apartajn brakapogilojn kaj pli similas al ordinara seĝo).

Klaras, ke tiu difino ne ampleksas ĉiujn uzojn de la franclingva *fauteuil* (kiu povas esti el tolo, vimento ks). Tie montriĝas, ke PIV (ankaŭ la nova) malprave difinas *fotelon* kiel simplan sinonimon de *brakseĝo*. Aliflanke, la diskuto montris, ke pluraj akademianoj ne atentis la difinon, donitan de la Akademio antaŭ pli ol 30 jaroj.

Tiu diskuto pri *fotelo* unuavice stariĝas la problemon pri la senco de *seĝo*, kiu, inter aliaj nomoj de sidiloj, (benko, benketo, tabureto, skabelo, sofo, kanapo, divano, trono) estas certe la plej ofte uzata. Ŝajnas, ke ĝi entenas la jenajn signiferojn: (supernocio: sidilo) kun piedoj, por unu persono, kun dorsapogilo. La difino de PIV ("meblo, destinita por la sido de unu persono.") estas do nesufiĉa. Laŭ PIV ekzistas ankaŭ *apogseĝo* aŭ *brakseĝo*: "seĝo kun dorso kaj brakoj por sin apogi sidante". Sed la registrado de *kromseĝo*, *faldseĝo*, *fer-*



Fotinto dum akademia kunsido rimarkigis la ĉeeston kaj de brakseĝo kaj de fotelo. (Fotis F. Lo Jacomo)

*dekseĝo, ĥorseĝo, klapseĝo, rulseĝo, pufseĝo*, al kiuj oni povus aldoni la sintagmon *la Sankta Seĝo*, donas la impreson, ke *seĝo* en tiuj kunmetaĵoj havas la tre vastan sencon de *sidilo*. Sed tio ne plene veras, kiel atestas la ekzisto de la terminoj *tabureto*, *skabelo*, *trono*, *fotelo* (se konsideri nur la unupersonajn sidilojn). Eble pli ĝustas akcepti, ke *seĝo* okupas centran, kvazaŭ hegemonian lokon en la konstelacio de la sidiloj, sen esti vera "supernocio".

Kiel por la marmelado, unu diskutanto provis solvi la problemon *brakseĝo/fotelo* per bildo, kaj fotinto dum akademia kunsido rimarkigis la ĉeeston kaj de brakseĝo kaj de fotelo. Feliĉe, la Ŝvarca konjekto ne praviĝis.

Tiu eta diskuto montris, ke en nia lingvo kiel en aliaj, la semantikaj limoj ne estas fiksitaj sennuance kaj senŝanĝe laŭ iu abstrakta logiko. Strebo al interkompreniĝo postulas tre atentan analizon de la signiferoj de la vortoj reale uzataj, por determini la interrilatojn de terminoj semantike najbaraj.

## Notoj

1. Vidu ekzemplojn en la ĉapitro "semantiko" de la verko de J. Wells, *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*.
2. En la sama verko.
3. En *Esprimo de sentoj en Esperanto*, malnova verko plu releginda.
4. "La problemo estas solvita!" — ekkriis Zamenhof (laŭ la letero al Borovko), sed malprave li konkludis, ke la derivitajn aŭ kunmetitajn vortojn "oni ne devas aparte ellernadi".
5. En *La bona lingvo*.
6. En privata letero, ne publikigita.

# Iom pala pro la rusto

La Nobel-premio por literaturo estas bedaŭrinde ankoraŭ unu el la plej prestiĝaj premioj de la mondo. Ĉiuj mem-deklaritaj spertuloj klopodas diveni la gajnonton, sed ofte la komitato surprizas ne nur ilin, sed ankaŭ la legantojn. Ofte pro stranga elekto.

## La nekonsideritoj

En 2008 estis alimaniere. Jam komence de oktobro ni sciis, kiu **ne** gajnos la premion. La konstanta sekretario de la Sveda Akademio, Horace Engdahl, deklaris en intervjuo al AP, ke ne hazarde tiu premio plej ofte iras al verkisto en Eŭropo, ĉar tie li vidas la centron de la monda literaturo. Eŭropo allogas persekutitajn verkistojn de Azio kaj Afriko. Kaj pro tio, daŭrigis Engdahl, Usono estas tro izolita ĝuante sian propran fipopularan kulturon por esti grava. “Usono ne tradukas sufiĉe por partopreni la grandan dialogon de la literaturoj”. Kaj la amaskulturo malaltigas la kvaliton.

Al la akademia sekretario ne mankas memfido. Ni do sciis sufiĉe frue, ke nek Thomas Pynchon, nek Don DeLillo, nek Philipp Roth, nek Richard Ford, nek Anne Tyler, nek John Updike, nek Joyce Carol Oates, nek Cormac McCarthy, nek E. Annie Proulx, nek Edward P. Jones, nek T. C. Boyle, nek Paul Auster, nek Jonathan Franzen, nek Siri Hustvedt, nek Jonathan Safran Foer (la listo povus esti pli longa) iam ricevos la premion, se ĉio iros laŭ la opinio de Engdahl. Plej trafe komentis tiun arogantan sintenon Giles Foden en *The Guardian*: “Bullshit”. Poste Engdahl iom indigne sentis sin miskomprenita, sed verdire, kion eblas miskompreni en liaj simplaj eldiroj?

## La Akademio de Nesciantoj

La dua deklaro de Engdahl estas eĉ pli ekster la tagordo. Ekzemple, ke en Usono verkas preskaŭ nur Khaled Hosseini (el Afganio), Chimamanda Ngozi Adichie (el Niĝerio), Bei Dao kaj Ha Jin (Ĉinio), Daniel Alarcón (Peruo), Norman Manea (Rumanio), Gary Shteyngart (naskiĝis en “St. Leninburg”), Aleksandar Hemon (Bosnio), Horacio Castellanos Moya (Salvadoro) kaj multaj aliaj, kiuj donas freŝajn impulsojn al la literaturo de Usono kaj gajnas premiojn tie. Estas ĉagrenige ke homo, kiu tiom klare malkonas la nuntempan literaturon, administratas la plej gravan literaturan premion en la mondo.



## La Premiito

La Komitato do elektis verkiston el Eŭropo, Jean-Marie Gustave Le Clézio. Oni povas demandi: pro kio? Same kiel Pinter aŭ Lessing li jam pasis la pinton de sia kreiveco. Post 1980 ne venis multe da valoroj verkoj de Le Clézio, sed vico de preskaŭ modele malbonaj verkoj.

Sed ni komencu je la origino. En la 50aj jaroj regis en Francio la *nova romano*: abstraktaj romanoj aŭ speco de “intelekta gimnastiko” tedega por la publiko. Kiam en 1963 Le Clézio publikigis la romanon *La Protokolo*, la kritiko vidis en tiu “bela junulo de Nico” revenon al pli tradiciaj formoj. Le Clézio tamen ne komplete lasis la eksperimentojn.

*Terra amata* (originala titolo de romano de 1967) eble estas la plej eksperimenta lia verko. Li uzas diversajn kodojn (morsan alfabeton, gestlingvon, desegnan lingvon transformitan al vorta priskribo, fremdajn lingvojn) kaj aplikas diversajn stilekzercojn. Li ankaŭ inkluzivas la leganton en la verkon. La verkisto skribas, sed la verko estiĝas nur en la kapo de la leganto. Kaj eĉ post finlegado la universo de la romano ankoraŭ ne finiĝas. La lastaj vortoj al la leganto estas: “Nun estas via vico por kunagi”.

La juna Le Clézio eksplikis sian filozofion en la eseero *La materia ekzisto*. Tamen la demando (de kie? — kien?) ne estas originala, nek estas la respondo. Ĉiu studento de filozofio povas doni similajn respondojn post la unua semestro.

Tiuepoke Le Clézio draste draŝas la kapitalistan okcidenton (eble pro tio li fariĝis taŭga kandidato por la komizoj en Stokholmo). La urboj ne estas loĝeblaj, postkuri materialajn valorojn estas vanto

kaj tiel plu, mallonge: universala mizero. La vivo estas tragika. Ni ne bezonas francan junulon por scii tion, sed Le Clézio diras tion en originala maniero, foje eĉ en brila maniero. Iom post iom liaj protagonistoj lernas forlasi la opresan socion, do la okcidentan civilizacion. La feliĉon eblas trovi vivante en agordo kun la naturo, ju pli sovaĝe kaj ekzotike, des pli feliĉe. La plej grava verko de tiu tendenco estas probable *La Dezerto* (1980). Lajla estas infano de l’dezerto kaj kredas je la fortoj de la naturo. Ŝi devas portempe vivi “inter la sklavoj” en Marsejlo, sed fine ŝi sukcesas reveni al la perdita paradizo, la dezerto. Kaj ekde tiam li remaĉas la modelon de *La Dezerto*, foje kun iom da sukceso, kaj tiam li estas kiel Rousseau je reduktitaj kalorioj, pli ofte tamen sen troa sukceso kaj tiam li kvazaŭ paŭzas *La Bluan Lagunon*.

## Alternativoj?

Akademio Goncourt donis sian premion ĉi-jare al Atiq Rahimi, rifuĝinto el Afganio, la premion Booker ricevis Aravind Adiga el Bharato, kaj tiel plu. La literaturo, juna kaj aŭdaca, ankoraŭ troveblas. Tiuj verkoj eble ne estas perfektaj, sed ili plenas de entuziasmo kaj spiras novan vivon en la literaturon. Por ricevi la Nobel-premion por literaturo necesas esti ankoraŭ vivanto. La rusto en la skribomaŝino ne ĝenos la sekretarion.

## Epilogo: kaj plu misjuĝoj

Ekde 2005 la mafio (pli precize: la Camorra) en Italio minacas la vivon de la verkisto Roberto Saviano. Li priskribis la metodojn de tiu krimorganizaĉo. Kaj tio finis la privatan vivon de Saviano. “Mi volas aĉeti propran domon, mi volas enamiĝi, manĝi kun miaj amikoj...”, — diris Saviano, kiu praktike estas en la kaptiteco de la mafio. Por rehavi sian propran vivon, Saviano pripensas forlasi Italion. Tio ja signifus venkon de la mafio... malvenkon de demokratio. Tiamaniere interpretas manpleno da nobel-premiitoj (Dario Fo, Miĥail Gorbaĉov, Rita Levi Montalcini, Günter Grass, Orhan Pamuk kaj Desmond Tutu) en preskaŭ senprecedenca ondo da solidareco kun Saviano.

Nur la Sveda Akademio kaj ties sekretario postulas, ke ili ne “enmiksiĝu en politikaj aferoj”. Por Engdahl temas pri “nura polica afero”. Ĉu li rapide forgesis, ke li fanfaronis pri Eŭropo kiel tereno de libera esprimo? Kun la ago de tiu sekretario la Nobela premio draste kaj rapide perdos sian moralan valoron. Bedaŭrinde kaj ankoraŭ senbremse.

**Wolfgang Kirschstein**



## Impona, sed ankoraŭ amatora

OV, LZ, PVZ: sub ĉi sigloj kaŝiĝas kaj resumiĝas tri etapoj en la editorado de la Zamenhofa verkaro. En 1929 unuan provon realigis la germano Johannes Dietterle (1866–1942) per sia *Originala Verkaro* kiu celis kunigi la tiam konatajn traktaĵojn, artikolojn, paroladojn, leterojn kaj poemojn de Zamenhof. Baldaŭ post la dua mond-milito (1948) la franco Gaston Waringhien (1901–1991) prezentis du volumojn kun *Leteroj de Zamenhof*, ĉefe al la esperantistaj aktivuloj en Francujo ĝis 1914. De tiam, ie kaj tie, sed ankaŭ en libro-forma leter-kolekto de Adolf Holzhaus (1892–1982) aldoniĝis multaj novaj korespondoj tiel, ke inter 1973 kaj 1992 la japano Itô kanzi (1918–2005) povis entrepreni la sisteman kolekton de la konata materialo. Al sia entrepreno li donis la barokecan nomon (ĉiam per la tipaj minuskloj de Itô): *iam kompletigota plena verkaro de l. l. Zamenhof*. Ĝi dividiĝas en tri sekciojn:

I. Volumoj 1–10 bis (fakte 16 volumoj): 1973–1992. 5817 p. Ili entenas la kompletan originalan verkaron de Zamenhof en kiu la leonan parton prezentas leteroj.

II. Tradukoj (7 volumoj): 1984–1990. 3687 p.

III. Aldonaj dokumentoj (10 volumoj): 1982–1992. 2993 p.

Por faciligi la konsulton ĉefe de la korespondo kaj por restarigi plene la principon de la kronologio, Itô aldone aperigis tri-voluman eldonon *iom reviziita plena verkaro de l. l. Zamenhof* (1989–1991) kun entute 2981 paĝoj.

Kvazaŭ ĉi 35 volumoj ankoraŭ ne sufiĉus, li realigis alian ambician planon: rehavigi, per fotorepresoj, ĉiujn verk(et)ojn aperintajn inter 1887 kaj 1899. Tiujn titolojn el la pratempo de Esperanto li nomis (kiel jam pli frue Waringhien) *inkunabloj* kaj kunigis ilin en serio tute senprecedenca: *ludovikologia dokumentaro* kun sume 21 volumoj kaj 9685 paĝoj. La reeldono de la *Kolekto aprobita de Zamenhof* li ja ankoraŭ planis, sed ne plu povis efektiviĝi.

Sed ni turnu nin al la 16 volumoj de PVZ en ties unua sekcio, la vera kerno de PVZ. Kiel Itô aranĝis ilin?

Kiel kreskinta organika tuto la volumaro dividiĝas fakte en du seriojn: la efektivaj originalaĵoj (artikoloj, paroladoj, sed ĉefe leteroj):



PVZ 2 (1974): 1887–1891: ni laboru kaj esperu!

PVZ 3 (1974): 1892–1895: antaŭen al laboro!

PVZ 4 (1975): 1896–1900: tamen la afero progresas!

PVZ 6 (1979): 1901–1904: kun gradaj paŝoj eksterlanden!

PVZ 7 (1980): 1905–1906: klopodis organizi, sed vane!

PVZ 8 (1980): 1907–1908: por kaj kontraŭ reformoj!

PVZ 9 (1991): 1909–1917: mortinta, sed senmorta!

PVZ 10 (1985): 1887–1917: postrikolto de ludovikaĵoj

Kiel videble, la titoloj de ĉi ok volumoj iel signalas etapojn en la esperantista vivo de Zamenhof kun ties suproj kaj malsuproj, malfaciloj kaj sukcesoj. Ĉirkaŭ ili orbitas aliaj ok volumoj kun aldonaj dokumentoj, klarigoj kaj suplementoj:

PVZ 1 (1973; 2. eld. 1987): unuaj libroj por esperantistoj

PVZ 1bis (1979): la inkunabloj de esperanto

PVZ 5 (1976): hebreo el la geto: de cionismo al hilelismo

PVZ 6bis (1988): la franca periodo de esperanto kaj louis de beaufront

PVZ 7bis (1984): la neforgeseblaj kongresoj

PVZ 8bis (1989): kiel esperanto venkis?

PVZ 9bis (1989): konfliktoj inter esperantistoj

PVZ 10bis (1990): milito ĉion detruas: 1912–1914

En ili Itô komentas la tekstojn de Zamenhof kaj por la nun-tempa leganto metas ilin en la historian kuntekston. Tiele ni ekscias pri la paralelaj klopodoj de Zamenhof pri religia superstrukturo (hilelismo/homaranismo), pri la rolo de Louis de Beaufront kaj aliaj pioniroj en Francujo kaj pri la emocia-stabiliga rolo de la fruaj kongresoj. PVZ 8bis aludas al simila titolo de Lev Ivanoviĉ Ĵirkov (*Kial venkis Esperanto?*, 1931), kies

kvintesenco estis, ke la inerto de la poŝtmarko-kolektantoj venkis la konkurencon de Ido. Kvankam la abundo de la materialo imponas, ĝi impresas tro senkohera kaj ne spertis la homogenigon kiun Itô faris al la tekstoj mem per la menciita tri-voluma originalaro. Ja sentiĝas la bezono de konciza scienca komentario al la tekstaro de Zamenhof, ties scenejoj kaj la roluloj tie agantaj.

En 1987, okaze de dua eldono de sia PVZ 1 Itô humure kaj ironie memoris pri mia kritiko el 1973 (“valora, sed diletanta”), sed neniam kuspigiĝis pro ĝi. Male, ĝis la fino ni havis frukto-donan kunlaboron el kiu enhave profitis lia entrepreno. Formale kaj procedure mi lin lasis: neniu kontestos la apartan ĉarmon de liaj postparoloj nek eĉ de lia cigno-kanta *pri nia pvz-ado* (2004), des malpli de liaj interesaj demandoj kaj atentoj pri aspektoj en la vivo de Zamenhof (kies “senlegendan” biografion li verkis en 1982) kaj de la historio de Esperanto de li verkita en 1998, sed ĉio ĉi restos ligita al lia aparta personeco kaj ne liberigos la futuran zamenhofan filologion de la dirita neceso pri scienca komentario nek de la restarigo de aŭtentaj tekstoj surbaze de ankoraŭ ekzistantaj originaloj kaj/aŭ faksimiloj. Eble tiel estiĝos la *fine kompletigita plena verkaro de zamenhof*. Ĝis tiam la nuna kolekto servos tiel al la amatoroj kiel al la biografoj de Zamenhof. Ĝia disponeblo en grandaj sciencaj bibliotekoj tial tre dezirindas. Certe la impona verkaro postlasita de Itô kanzi kronas, sed espereble ankaŭ finos la epokon de amatoreco.

### Bibliografiaj notoj

ZAMENHOF, L. L.:

*Originala verkaro*. Kol. kaj ord. de Joh. Dietterle. Leipzig: Hirt, 1929. 604 p.

*Leteroj. La tragedio de lia vivo* [...]. Prezento kaj komento de G. Waringhien. Paris: SAT, 1948. 2 vol. 767 p.

*Leteroj*. [Ed.] Adolf Holzhaus. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1975. 329 p.

*Iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof*. Kioto: Ludovikito, 1973–1992. 18 vol. 5817 p.; Parto dua. [Tradukoj.] 1984–1990. 7 vol. 3687 p.; Parto tria. 1982–1992. 10 vol. 2993 p.

*Iom reviziita plena verkaro*. Originalaro. Kioto: Ludovikito, 1989–1991. 3 vol. 2750 p.

*Ludovikologia dokumentaro*. Kioto: Ludovikito, 1991–2004. 21 vol. (1–19, 25–26). 9685 p.

Reinhard Haupenthal



# La kvina telero

Novelo de Dorota Terakowska

Mian neantaŭviditan vigilian teston pri homeco mi plenumis apenaŭ mezbone. Estas vero, ke plej multajn embarasojn kaŭzas al ni niaj propraj infanoj, kaj ĝuste ili plej rapide malkaŝas nian malperfektecon.

Ĉiujare, kiam miaj filinoj aranĝis antaŭkristnaskan vespermanĝan tablon, mi memorigis al ili kun nobla patoso:

— Memoru pri la tradicia aldona malplena telero por neatendita gasto! Ĉiam povas aperi iu soleca aŭ malfeliĉa, kaj Kristnasko ja estas festo de amo al proksimulo!

— Jes, — ili diris kun komprenemo kaj starigis kvin manĝilarojn sur la tablon: por panjo, por paĉjo, por si mem kaj por tiu *iu*.

Sincere, tiu kvina telero ĉiam restis malplena. Jen bela simbolo. Tiujare, en 1986, ŝajnis ke estos same, ĉar kial povus esti alie? Kiu fremdulo kuraĝus frapi ies pordon dum la vigilia vespero, la vespero rezervita por la familia intimeco? Jes, iun fojon venis najbarino kaj demandis, ĉu mi povas doni al ŝi tri pecetojn da fiŝo, ĉar ŝi tiom ekŝatis sian karpon, ke ŝi ne povas ĝin mortigi (“Ĝi alfluas, aŭdante mian voĉon kaj levas faŭketon por karesi ĝin”, — ŝi diris kortuŝite. Do mi donis al ŝi rapide tri porciojn, ĉar rakonto pri la spirita vivo de ŝia karmo malbone influas mian propran spiritan vivon. Ne hazarde mi plej ŝatas la sanktan Franciskon el Asizo.)

Kasia jam aranĝis la tablon, la edzo bongustigis brasikon, ravioloj estis preskaŭ finkuiritaj, sed ie malaperis Maĝosia. Ŝi havis nur taskon promeniĝi hundon, sed la hundo kuŝis sub la tablo, kaj Maĝosia malestis. Ĝuste kiam la ravioloj finkuirigis iu frapis la pordon.

— En tiu momento? — koleriĝis la edzo.

— Jes, en tiu momento? — mi ripetis.

Kasia malfermis larĝe la pordon. Sur la sojlo staris ridetanta Maĝosia kaj... nekonata, konfuzita maljunulino.

— Kiu ŝi estas? — flustre demandis la edzo kaj la pli aĝa filino.

— Jes, kiu? — mi ripetis, sed Maĝosia jam tiris la nekonatinon en la loĝejon, senvestigante ŝin el dika tuko, malnova mantelo kaj du pulveroj.

— Ankaŭ ŝuojn, por ne kotigi plankon, — diris la maljunulino, etendante siajn kruojn en grandaj feltŝuoj.

— Momenton, — mi ekkriis kun kreskanta kolero. — Maĝosia, kiu estas tiu sinjorino?

— Tiu sinjorino estas por la kvina telero, — diris entuziasme Maĝosia.

— Por la kvina telero? — ripetis la edzo kun brilo de komprenemo en la okuloj.

— Sed la kvina telero ĉiam staras malplena, — prudente rimarkis la pli aĝa filino.

— Malplena, ĉar ĝi atendas, — rompis ŝin Maĝosia, demetante la duan ŝuon de la piedo de la maljunulino, sur ŝiaj piedoj restis nur truhavaj ŝtrumpoj, ne certe puraj.

Mi eksentis, ke interne mi bolas ne malpli ol la kuirataj ravioloj kaj, kiam la embarasita edzo kaj ne malpli konsternita Kasia kondukis la maljunulinon en la ĉambron, mi entiris Maĝosian en la kuirejon.

— Kion vi faraĉas? — mi grumblis. — Vi venigas en la hejmon fremdan personon, kiu eble estas ŝtelistino? Kaj kiam? Dum la vigilia vespero?! Ĉu vi frenezigiĝis?!

— Sed la kvina telero... — senhelpe flustris Maĝosia. — Vi ĉiam diris, ke ĝi atendas iun malfeliĉan kaj solecan, kaj tiu maljunulino *vere* estas soleca kaj malfeliĉa! Mi pruntis ŝin el maljunulejo speciale por ni!

— Vi pruntis?! Jesuo... — mi komencis kolere kaj... eksilentis. Subite mi ekkonsciis, ke post kelkaj horoj, noktomeze, mia hundo kaj du katoj komencos interparoli homvoĉe, sed mi *grumblas!* Mi grumblas pri la kvina telero, pri kiu mi tiom rezonas, kiam komenciĝas la vigilia surtabliga ceremonio. Mi suspiris profunde kaj finis la frazon: — Jesuo... do, vi bone faris.

Dum la dividado de oblato la maljunulino rakontis pri siaj du filinoj kaj filo, kiuj ie ankaŭ dividas inter si oblaton, sed ili ŝatas havi ĉe la tablo neniujn

maljunulinojn — nek siajn, nek fremdajn, ĉar la maljuneco detruas ilian bonhumoron. Manĝante ruĝan barĉon kun ravioloj, ni eksciis kiel okazadis vigiliaj vespermanĝoj en la orienta Pollando. Tie dum la vigilia vespero altabliĝis dek ses personoj el kvar generacioj. Poste, manĝante fiŝon, ni eksciis, ke la maljunulino estis instruistino, sed “ĉiam venas tago, kiam nek propraj, nek fremdaj infanoj bezonas vin”.

— Ĉu tiel? Kaj ni? — demande diris Maĝosia, kaj iel strange mi eksentis min pli certe.

Dum la manĝado de brasiko kun fungoj la maljunulino rakontis pri sia mortinta edzo (“Li tro ŝatis virinojn, sed almenaŭ mi ne enuis kun li”), kaj ĉe konsumado de kazea kuko ŝi petis kvar aldonajn pecojn por siaj kunloĝantinoj, kiujn neniu pruntis.

Poste, kiam la filinoj akompanis la maljunulinon ĝis ŝia loĝloko, la edzo lavis la vazaron, la hundo kaj du katoj diskrete interparolis homvoĉe, mi ekmeditis pri la neatendita testo pri homeco, kiun mi plenumis apenaŭ mezbone... Mi meditis pri tiu stranga limo inter teoria kaj reala amo al la proksimulo. Ĉar plej facile estas meti la kvinan teleron kaj kalkuli je tio, ke ĝi restos malplena — jen bela simbolo.

Do mi deziras al vi neatenditan gaston dum la vigilia vespero kaj batalu kun vi mem, kiel mi iam. Kaj ekparolu fine homvoĉe.

Tradukis Dorota Burchardt

*La kvina telero* de la kvakova ĵurnalisto kaj verkistino Dorota Terakowska (1938–2004) aperis en ŝia kolekto *Homo, jen la bona adreso* (Dobry adres to człowiek, 2004). La eldonejo *Wydawnictwo Literackie*, post interkonsento kun la heredantoj de Dorota Terakowska, permesis senpage aperigi la Esperantan tradukon en *La Ondo*.

Vigilio (pole *Wigilia*) estas antaŭkristnaska familia vespermanĝo en Pollando. En ĝi oni dividas blankapanajn *oblatojn*, bondeziras, kaj manĝas dek du senviandajn pladojn (la menciitaj ravioloj, pole *uszki*, estas farĉitaj ne per vian-do), inter kiuj devas esti fiŝaĵo. Tradicie sur la vigilia manĝotablo estas malplena telero por neatendita gasto.




## Temo pli profunde studenda

Laube, Jiří. *Ĉu kultura integriĝo de Eŭropo? Jes, sed nur per demokratia simbiozo de la kulturaj.* — Dobřichovice: KAVA-PECH, 2008. — 32 pĝ.

Kurta kiel kluba prelego, sed ne facile enkadriĝebla en la horizonto de la esearo, eble pro tio ke, kiel diras ĝia aŭtoro, verkita de fakulo laŭsiadire ne pri ĉiuj sciencoj esee referencitaj kaj pro tio ke la sinsekvo de la ideoj foje similas pli apudmeton ol reciprokan ligiĝon. Tamen el ĝi ŝprucas originaleco, kies centron — laŭ la recenzanto — oni povas resumi tiel: Esperanto estas ponto inter la du kulturoj de Eŭropo, tiu hebrea kaj tiu kristana, kies lingvoj — la antikva hebrea kaj helena-latina — ne nur iam prezentis “nevenkeblan abismon”.

Certe, tial oni des pli akcentas la iaman kaj nunan distanciĝon inter la du kulturoj, ju pli originala kaj valida aperas la funkcio de Esperanto tiusence. Ĉi-rilate la aŭtoro plezurigas rimarkigi, ke la hebrea kulturo baziĝas sur la movo de vorto-ideoj (“kvazaŭ survoje”) same kiel la nomadeco, iama kaj nuna, de la hebrea popolo, dum la helena-latina, kaj ĝenerale la eŭropaj lingvoj, preskaŭ fiksiĝas en la “nocio”: Movo = nova realiĝo, Nocio = solidiĝo. Pardonpetante pri tiu skizumaĵo kaj pri la jena citaĵo naskiĝinta el miaj preferataj taskoj: tio memorigas pri disputo inter Sokrato kaj Kratilo en la tiunoma Platona dialogo, en kiu kontraŭ heraklitistoj Sokrato observas, ke se la aĵoj tiom daŭre ŝanĝiĝas la nomado mem fariĝas neebbla, kaj Platono por forfuĝi el la “panta rei” inventis la solidecon de la hiperuraniaj ideoj. Kiel ajn, ekscesa aŭ ne, tiu distingilo inter vorto-konceptoj en movo kaj blokanta “nocio”, ekscitis en la aŭtoro la ideon pri Esperanto trape-netrita de du tute tre malsamaj kulturoj, nome tiuj kiuj faris kaj faras Eŭropan integriĝon. Esperanto, do, estas utila por semi komprenadon kaj homan akceptadon de tio, kio kuŝas en la semida kulturo, inkluzive de islamo, kaj tiel ĝi favoras la pliintegiĝon.

Rilate la integriĝon ne estas subtenata nur tiu ideo: estas asertata ankaŭ, ke la integriĝo en la Eŭropa Unio (sed certe ne ekskludiĝas la multaj facetoj de la realo de Eŭropo kun ties, ekzemple, diversaj kaj malsamaj kristanismoj) povas realiĝi nur en kunteksto de demokratio. Facilas konsenti kun li, kaj oni ne faras maljustaĵon al la eseo se la aŭtoro por tion elmontri ne disponas pri oportuna spaco por ĝustigi se ne elfosante ion de la pensadoj de kelkaj famaj nomoj.



Rilate famajn nomojn, li apoge al si citas Chomsky, el kiu estas akceptata, kiel io definitiva, la koncepto-malkovro de la “genera gramatiko”, ĉar ĝi ĉeestus en la parolantaro de ĉiu lingvo regulante la ties evoluon kaj kulturenhan formiĝon, kiu krome estus io aparta. Certe, la teorioj de tiu lingvisto povas helpi Esperantan lingvismon malgraŭ lia estimo-manko al Esperanto. Kaj mi, por kreskigi la atenton de niaj lingvistoj, demandas: ĉu Esperanto sin konstruas kaj evoluas ene de sia “genera gramatiko” kiu respektu la kanonojn de la Chomsky-a genera gramatiko, aŭ ĉu en ĝin oni enirigas ion devigan?

Rilate devigojn, Laube sinapoge profitas alian faman libron, la *Kolizion de Civilizacioj* de Samuel Huntington, laŭ kies centra ideo tia kolizio estas neevitebla. Samfamaj fakuloj objetas, ke la kulturoj estas ĉiam en silenta aŭ aperta dialogo kaj, do, ne eblas kolizio. Se Jiří Laube profitas ĝin, tio ne signifas ke lia tezo pri la interkomprenado kaj plia reciproka akceptado pere de Esperanto inter la du fontaj kulturoj de la eŭropa kultura karakterizo perdas sian originalecon.

## Historio de nia literaturo ekpretas

(HeKo). Estas enpaĝigitaj la unuaj ok ĉapitroj de la *Historio de la esperanta literaturo*, kunverkata de Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer, kaj eldonota de LF-koop. Ili ampleksas la unuan periodon: 1887–1921.

Kiel por ĉiu periodo, la unua ĉapitro priskribas la ĝeneralajn trajtojn kaj la lasta estas dediĉita plene al teatro. Tiujn du ĉapitrojn kutime aŭtoras Giorgio Silfer. La sekvaj ĉapitroj ĉi-kaze pritraktas la verkaron kaj rolon de Zamenhof kaj Zamenhofoj, la varsoviajn dioskurojn de nia tagiĝo, la postbulonjan spiriton, la rusan influon, la magian jarduon 1911–12. La poezian parton (sed ne nur) verkas precipe Carlo Minnaja, la prozan (sed ne nur) precipe Giorgio Silfer.

La historikkritika verko estas riĉe ilustrita (ĉiu paĝo kun almenaŭ du bildoj); ĝi donas nekutime vastan gravecon al la virinoj, kaj ĝi estas facile konsultebla.

Tamen tiu originaleco foje perdas reliefon pro la ignorata multifaceteco de la vortoj “kulturo”, “kulturoj”. Ankaŭ dum legado de ĉi tiu eseeto venas deziro pri io plia, ĉar la multifacetan “kulturon” ne eblas entenigi tra unusola “nocio”. Okazas same ankaŭ ĉe aliaj niaj verkistoj kaj ĉi tie certe pro la fidoplena nekribrado de konceptoj.

Lasta noto, tre marĝena. Estas dirate, ke en la katolika eklezio la problemo de la lingvo estas ankoraŭ ne solvita. Sed laŭ mi ĝi estas solvita surbaze de la principo: en la liturgio oni uzu la lingvon enlande parolatan — el tio la daŭra adekvatigo en la respekto de la kredo — dum en la oficialeco restas la latina, valida super ĉio pro ĝia tradicia forto kaj precizeco. Kaj Esperanto? Ankaŭ ĝi trovos lokon, kreskante kun la kresko de ĝia parolantaro. Certe, temas nur pri la opinio de la recenzanto.

Mi rezignas diri ion pri la Esperanto de la aŭtoro multelingve praktikanta kaj estimata nialingva verkisto, ankaŭ pro tio ke ne ĉiuj recenzantoj emas tion obsede flari, ĉar Esperanto jam eliris el la infaneca stato, kaj nun iras al tiu kiu ŝajnas esti, laŭ mi, la centra ideo inda je atento. Mi deziresprimas, same kiel la aŭtoro mem, ke aliaj fakuloj bonvolu studi la temon pli profunde, ĝin amplekse larĝigu laŭ la laŭdinda intuicia ligo de ideoj, inter kiuj elstaras tiu nefacila sed sugestia, laŭ kiu Zamenhof lasis, konscie aŭ ne, en sia kreaĵo la ĝermojn de reciproka fekundiĝo kaj integriĝo inter la fontoj de la du kernoj de la eŭropa kulturo.

Fine iomete pri la aŭtoro: ĉeĥa esperantisto, post reveno el malliberejo, en kiu li longe restis “pro krimoj kontraŭ la komunista reĝimo”, kaj post multifacetaj intelektaj laboroj, li nun estas pensiulo. Okaze de lia 85-jariĝo oni publikigis ĉi tiun broŝuron, kiu resumas liajn ekkononjn pri la kulturaj radikoj de la eŭropa civilizo.

Armando Zecchin

## Invitprojekto

**Raportoj pri la Invitprojekto. 20 invititoj el Azio al la 92a UK en Jokohamo / Antaŭparolo de Hori Jasuo. — Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 2008. — 72 pĝ., il.; 500 ekz.**

Japana Esperanto-Instituto (JEI) invitis al la 92a Universala Kongreso en Jokohamo dudek aktivajn esperantistojn el naŭ aziaj landoj, kiuj estis selektitaj el 54 kandidatoj. Por ĉiu persono estis trovita japana prizorganto, kiu fiksas la tagordon de sia invitoto dum la restado en Japanio kaj zorgis pri la invitado. Dum speciala Amika Kunsido JEI kuraĝigis la invititojn diligente, sed ĝue, partopreni en la Kongreso.

La celo de la projekto estis atingi, ke la UK en Azio havu azian etoson. La projekto, laŭ ĝiaj iniciatintoj, sukcesis.



Hori Jasuo, prezidanto de la invitkomitato, priskribas la projekton kaj problemojn renkontitajn por efektivigi ĝin. Aldonita kasraporto montras la elspezojn por la invititoj: kongresa kotizo, vizaranĝado, flugoj, dumkongresaj loĝado kaj manĝado, asekuro. La prizorgantoj kaj/aŭ la lokaj Esperanto-societoj kovris la elspezojn dum la eksterUKa programo.

Plie la libro enhavas dudek raportojn de la invititoj, ĉiun akompanas fotoportreto de koncernato, foje aldoniĝas ankaŭ grupaj fotoj. Komence estas bazaj informoj: nomoj persona kaj familia, nacieco, okupo, naskiĝdato kaj prizorganto. La raportoj enhavas impresojn pri la Kongreso kaj pri Japanio, pri renkontiĝoj kun japanaj samideanoj kaj oficialuloj, pri ekskursoj. La prizorganto donas superrigardon pri la tagoj de la invitito en Japanio. Multaj faris ankaŭ tre interesajn konkludojn pri la personeco, konduto kaj kutimoj de sia prizorganto.

Bona ideo, bona realigo, kaj bona postrikolto — broŝuro trioble pli ampleksa ol *La Ondo*. Espereble ĝin studos kaj utiligos organizantoj de estontaj kongresoj.

HaGo

## Libro vere bonkvalita

**Al-Amily, Husejn. La trezoro: Kolekto de 3.000 proverboj kaj anekdotoj el la araba kaj islama kulturo / Antaŭpar. Renato Corsetti. — [Roterdamo]: Araba Komisiono de UEA, 2008. — 137 pĝ., il.**

En la konscio de okcidentanoj la adjektivoj “araba” kaj “islama” iĝis preskaŭ sinonimoj, nuntempe trouzataj de mondmaskomunikiloj kun la substantivoj “minaco” kaj “terorismo”. La akuzoj ne estas tute senbazaj — inter diversspecaj ekstremistaj organizaĵoj la islamaj okupas sian “indan” lokon. Tamen ju pli malbone oni konas ion, des pli da superstiĉoj oni havas pri tio — esperantistoj ja ofte sentis kaj sentas proprahaŭte la pravecon de tiu diraĵo! *La Trezoro* de Husejn Al-Amily plenumas la noblan celon konatigi neislaman legantaron kun la antikva kultura tradicio de la araba popolo.

La sorto de la popoloj estas tiu kiel de la homoj: unuaj ĉiam ĝuas ĝian favoron, aliajn ĝi eĉ ne rimarkas kaj ili restas en la ombro de la unuaj; kaj la triaj, kvaŭzaŭ laŭ kaprico de fortuna, jen atingas la pinton de sia gloro kaj potenco jen mergiĝas en abismon de mizero kaj malforto.

La sorton de tiuj lastaj plene trasentis araboj. Kiel sablovento de sia dezerta hejmlando ili enflugegis en la mondon, portante sur la pintoj de siaj lancoj lumon de ĵusnaskita religio, rompante landlimojn, absorbante popolojn kaj gentojn; dum du generacioj ili kreis gigantan imperion de Atlantiko ĝis Pamiro kun brila kulturo kaj scienco prosperintaj en dekoj da homplenaj urboj.

Post kelkaj jarcentoj la imperio disfalis sub la batoj de novaj mondkonkerantoj kaj pro internaj perturboj. Finfine ili perdis eĉ la efemeran privilegion gvidi la islaman mondon — post morto de la lasta arabdevena kalifo tiun titolon proprigis al si la Osmana sultano.

Nur en la 20a jarcento sur la ondo de naci-liberiga movado araboj reakiris sendependecon, tamen dividitaj je dekelkaj ŝtatoj fronte al multaj eksteraj kaj internaj problemoj kiel malriĉeco, politika malstabileco kaj religia obskurantismo.

Dum la jarcentoj de la ekzisto de la araba popolo formiĝis ties kulturo en konstanta reciproka interŝanĝo kaj pliriĉiĝo kun kulturoj de la najbaroj. Vivosperto de generacioj, moralaj principoj, ideoj pri la homo kaj universo

sublimiĝis en abundaj proverboj de araboj. En la libro ili estas alfabet-orde vicigitaj laŭ temoj: de “abundo”, “aĉulo”, “advokato” ĝis “vole-nevole”, “vortoj”, “vualo”. Kune kun arabaj proverboj estas ankaŭ kurdaj, persaj, mezorientaj k.a.; apude troviĝas citaĵoj el Hadisoj — konsiloj de la Profeto.

Entute pli ol 2000 proverboj en 416 temoj akompanataj per mallongaj rakontoj (anekdotoj) kaj garnitaj per belegaj ilustraĵoj kaj arabstilaj miniaturoj.

Iuj el prezentitaj proverboj estas komunaj por multaj popoloj kaj ne enhavas ion specife araban, aliaj estas tute nekompreneblaj sen komentoj. Ekzemple, “li portis daktilojn al Basra” klariĝas per komento, ke Basra abundas je daktil-palmoj. Iuj aspektas tute moderne: “Rigardu antaŭ ol vi trinkas kaj legu antaŭ ol vi subskribas”.

Interesa estas la citaĵo el la Korano pri judoj: “Vi estas distingitaj inter nacioj, ĉar vi malhelpas malbonon kaj sekvis la ordonon por bono”.

Iom ŝancelas la opinion pri la araba militemo jenaj diraĵoj: “Instigo al malpaco estas pli grava ol murdado” kaj “Kredanto fanatika pri sia kredo estas ulo sen kredo”.

Kelkaj estas veraj perloj de saĝo kaj ironio: “Estu bona al via edzino, por senti la najbarinon”, “Rapida geedziĝo estas malrapida penton”, kaj “Se ĉiuj homoj diras, ke vi estas azeno, danku al Dio kaj bleku”.

La ampleksa temaro, multaj komentoj donas sufiĉe tutecan bildon pri la materia kaj kultura vivo de la araboj kaj de la islama oriento. Per tiaj libroj reale efektivigis la rolo de Esperanto kiel internacia ligilo kaj komprenigilo.

Tute superflua, miaopinie, estas nur la transliteruma tabelo de la araba alfabeto: unue, ĝi prezentas nur komencan formon de literoj el kvar eblaj depende de loko de litero en la vorto; due, sen konciza gramatiko kaj vortaro ĝi estas sentaŭga por la leganto.

Fine mi povas sincere diri, ke la libro estas vere bonkvalita forme kaj enhave. Ĝi nepre trovos siajn legantojn.

Nikolaj Penĉukov





## Sukcesa libro servo en Roterdamo

Laŭ la novembro revuo *Esperanto* la libro servo de la ĉi-jara UK en Roterdamo, kun vendoj atingantaj 40 504 eŭrojn, estas ĝis nun la plej bona de la nuna jardeko. Ĉi-sube estas listigitaj ĉiuj libroj el kiuj vendiĝis pli ol 15 ekzempleroj, kaj ĉiuj diskoj el kiuj vendiĝis pli ol 10 ekzempleroj. Ne estas listigitaj bildkartoj, glumarkoj, insignoj, flag(et)oj, skribiloj, ĉemizoj k.s., da kiuj vendiĝis centoj.

- 157 *Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA*
- 128 *Tuj apude* (H. Tonkin)
- 103 *Utila Estas Aliĝo* (U. Lins)
- 64 *Bona Espero* (R. Dobrzyński)
- 58 *Internacia Kongresa Universitato 2008* (Red. J.A. Vergara)
- 51 *Pasporta Servo*
- 46 *Ksenofobia gvidlibro al la nederlandanoj* (R. Bolt / S. Davies)
- 42 *La jaro 2009* (agendo)
- 40 *Komputeko*
- 40 *Vikipedio — praktika manlibro* (Red. Y. Nevelsteen)
- 31 *Poŝamiko* (B. Allée, K. Kováts)
- 29 *Vivo de Zamenhof* (E. Privat)
- 28 *Manlibro pri olimpikaj vortoj*
- 24 *Vojaĝo en Esperanto-lando* (B. Kolker)
- 22 *Pri vagabondoj kaj friponoj, pri damoj kaj kavaliroj* (L. Couperus)
- 20 *Kiam mi estis la plej feliĉa* (Red. J. Sigmond)
- 20 *La neceso akceptebla* (B. Ragnarsson)
- 20 *Esperanto Sleutel*
- 19 *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto* (G. Sutton)
- 18 *La trezoro* (H.M. Al-Amily)
- 18 *La Komuna Eŭropa Referenckadro* (Red. K. Kováts)
- 17 *Naturaj vortordoj en Esperanto* (W. Jansen)

## Fabelkonkurso 2008

Päätalo-instituto estas kultura-literatura centro en Taivalkoski, Norda Finnlando, nomita laŭ la eminenta verkisto Kalle Päätalo (1919–2000). Inter ĝiaj agadoj estas fabelkonkurso por finnaj infanoj ekde 1993. En 2000 la instituto aldonis al la konkurso Esperanton laŭ iniciato de la Vilaĝa Asocio de Metsäkylä el la municipo Taivalkoski. En 2008 ĝi okazis la naŭan fojon.

### A. Infanoj malpli ol 9-jaraj

1. *La reveno de la ora pomo* de Sonja MacGill, Hungario
2. *Sunbrilaĵo* de Denis Iljin, Ruslando
3. *Stulta museto* de Polina Matvejeva, Ruslando

### B. Infanoj 9–10-jaraj

1. *Signoj de fantomoj* de Katarzyna Lewak, Pollando
2. *Nomo de ĉevalo* de Alicja Kraszewska, Pollando
3. *La plej bona horloĝo* de Nikolas Mikolajewski, Pollando

### C. Infanoj 11–13-jaraj

1. *Kiam la ranoj havis felon* de Miranda Wilson, Svedio
2. *DOR* de Daniela Ungureanu, Rumanio

### Grupoj

1. *Papilietino verda* de Alicja Cichowska, Katarzyna Lewak, Monika Mierzwiak, Andrzej Rybak, Pollando
2. *Kolora mondo* de Jaime kaj Jorge Paez Honan, Kubo

La premion **Fabelo Internacia 2008** gajnis la fabelo verkita de Sonja MacGill (Hungario) *La reveno de la ora pomo*. Gratulojn al ĉiuj premiitoj kaj aliaj partoprenintoj! Dankon al la ĵurianoj: Raita Saliko Pyhälä, Sylvia Hämäläinen kaj Auli Vihermä. Dankon al UEA pro la premiolibroj kaj aŭspiciado de la konkurso!

Aini Vääräniemi

## Ricevitaj gazetoj

Antaŭen. 2008/3; Esperanta Finnlando. 2008/5; Esperanto aktuell. 2008/5; Esperanto sub la Suda Kruco. 2008/5; Esperanto. 2008/10,11; Espero.com.cn. 2008/1; Informilo. 2008/9,10; Kontakto. 2008/3; La Movado. 2008/692; La Ondo de Esperanto. 2008/11; La Sago. 2008/47; Norvega Esperantisto. 2008/5; REGo. 2008/5; Scienco kaj Kulturo. 2008/4; TEJO Tutmonde. 2008/4; Tempo. 2008/99.

## Bela kajero el Ĉinio

*Espero.com.cn* aperas unu fojon jare kiel papera kolekto de artikoloj aperintaj en la reta *El Popola Ĉinio*. La 64-paĝa ĉi-jara eldono enhavas la plej interesan materialon el la antaŭa jaro 2007.

Kvaronon da spaco okupas artikoloj pri la 17a Tutlanda Kongreso de Komunista Partio de Ĉinio (KPĈ), sendube grava evento por la tuta ĉina socio. Oni trovas komunikon pri la kongreso mem, organizan strukturon de la Centra Komitato de KPĈ kaj biografiojn de la membroj de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de CK KPĈ. Sekvas rakontoj pri modelaj KPĈ-membroj: partia funkciulo, lernejdirektorino, fakulo pri pandoj, mineralogo, urboficisto. En *Retro-rigardo* estas mallongaj informoj ligitaj kun Ĉinio.

Ampleksa rubriko *Harmonia socio* prezentas kontribuojn pri diversaj regionoj en Ĉinio kaj kiel homoj aranĝas sian vivon tie; sur konkretaj ekzemploj oni montras la pliboniĝon de la popola vivo. Interesaj artikoloj konigas tetrinkejojn en Pekino kaj Hutong-ojn, stratetojn de malnova urbo de Pekino, Hongkongon antaŭ dek jaroj revenintan al la patrolando, kaj la realan vivon en la legenda Shangri-La.

*Ekonomio* havas kontribuon pri agromonio, inventinta hibridan rizon, kaj pri mineralaj fontoj en Tibeto.

En *Homo kaj naturo* ni konatiĝas kun du medioprotektantoj: juna lernejanino el Pekino kaj sciencisto esploranta la regionon de Ĉomolangma.

Kuirarta rubriko per buntaj fotoj rakontas pri stratbudo de etmanĝaĵoj. La kvar finaj paĝoj estas dediĉitaj al la Esperanto-movado kaj -libroj.

La kajero mendeblas rete ĉe [elpc@china.com](mailto:elpc@china.com) kontraŭ nur 3 eŭroj.

HaGo

# Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

---

**Sendependa internacia  
revuo en Esperanto kun  
legantoj en 65 landoj!**

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco  
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

---

**www.monato.net**

---

Flandra Esperanto-Ligo  
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen  
[monato@fel.esperanto.be](mailto:monato@fel.esperanto.be)


Por la oktobra tasko *Anguletoj* venis dek unu respondoj, krom du, ĉiuj ĝustaj. La taskon ĝuste solvis: Edmund Grimley Evans (Britio), Bruno Lehtinen (Finnlando), Jackie Huberdeau (Francio), Marianna Boharewicz, Dorota Burchardt, Zbigniew Tylkowski (Pollando), Klara Ilutoviĉ, Jurij Kivajev, Svetlana Konjašova (Ruslando). La loto donis libropremion al **Marianna Boharewicz**. Ni gratulas ŝin!

**La ĝustaj respondoj.** *Desupre dekstren:* 1. Ĉilio; 2. Volum'; 3. Fingr'; 4. Mizio; 5. Podio; 6. Infer'; 7. Latuno; 9. Omleto; 11. Angio; 12. Orcin'; 13. Ratio; 14. Kamel'; 15. Medio; 16. Prism'. *Desupre maldekstren:* 2. Valuto; 3. Folio; 4. Monom'; 5. Paser'; 6. Indio; 7. Lofio; 8. Ostar'; 10. Orbito; 11. Aneks'; 12. Orgio; 13. Racio; 14. Katun'; 15. Mumio; 16. Pedal'.


## Metanagramoj

Por solvi la metanagramojn, oni devas al ĉiu antaŭa vorto aldoni unu literon, kaj poste anagramigi ĝin. Ekz., oro — roko — krono ktp. Uzendas nur radikoj, sen gramatikaj finaĵoj.

1. Partiga sufikso — muzika signo — maltago — kompano — drogaĉo



2. Pli ... — subkapajo — genetike identa ĉelaro — arki-  
tektura apogilo



3. La dua tono — nia propra astro — blanka skribilo —  
gebova produkto



La respondoj venu al ni poŝte aŭ rete antaŭ 10 jan 2009.

Kompilis **Tatjana Auderskaja**



**RADIO**  
**ESPERANTO**

**Radio Esperanto**

*Halina kaj Aleksander  
parolas el Kaliningrado*

Podkasta servo de *La Ondo*

Aŭskultu: <http://la-ondo.rpod.ru>

## Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

*el la kolekto de reduktoro*

### La hungaron benu, Di', / Per verb', predikato

La hungaran popolon la sekvantaj jaroj kun pliiĝontaj mal-facilaĵoj, novaj ŝarĝoj. (Johano Petik. *Politikaj kaj sociaj disvolvaĵoj en Hungario // Internaciisto*, 2008, №93, p. 15; rimarkis Ionel Oneţ)

### Ĉu por danaj pilgrimantoj?

... la dana gazeto "24 timer"... estas unu el la kvar ĉiutage jen rete jen papire senpagaj gazetoj... (Betty Chatterjee. *Agado per blogado // Nordhungaria Informo*, sep 2008, p. 18; ankaŭ [www.epa.oszk.hu/01000/01049/00037/pdf/00037a.pdf](http://www.epa.oszk.hu/01000/01049/00037/pdf/00037a.pdf))

### Ne prude kaj pagite, sed trude kaj agite

[La partio *Eŭropo Demokratio Esperanto*] ankaŭ planas en sia programomalmetaĵo trudi al gravaj amaskomunikiloj dissciigi informojn pri debatoj kiuj agitas eŭropajn instancojn... (*Eŭropa Voĉo*, 2008, №9, p. 2)

### En financa krizo bankoj harakiras

Mia edzino Erika... multfoje ĝiris siajn harojn, reviziante tekstojn tradukitajn el la pola... (Roman Dobrzyński. *Vivo de Romano // FRESXO*, 2008 №21/42, p. 8)

### La gaja scienco

Ĝuste antaŭ la UK en Roterdamo kunvenis universitatanoj kiuj intruas interlingvistikon aŭ Esperanton... (Federico Gobbo. *La neceso reinventi Budapeŝton // Esperanto*, 2008, №10, p. 206)

### En fremda tegmento ili boras truon?

... esperantlingvaj komunumanoj... ĉe neesperantista socio... efikos ĝuste per sia aŭtenteco, kultureco kaj nesintruado. (Deklaro de Pola Studenta Esperanto-Komitato, 1980 11 10/14, en <http://www.esperantio.net/index.php?id=187>; rimarkis Lu Wunsch-Rolshoven)

### Kuŝu ge-trankvile en la verda lito

Oni ne bezonas ŝanĝi manierojn indormi pri esperanto... (Komento de Valdi en la blogo de Ladislao Szöke, <http://www.ipernity.com/blog/28101/82367/comment/2735053#comment2735053>)

### Ivonimoj

Ivo Lapenna mem verkis multegajn artikolojn, ofte sinonime, ĉar li opiniis, ke ne estis oportune, ke lia nomo tro ofte aperu. (<http://www.geocities.com/CapitolHill/Senate/1240/memore.html>; rimarkis Lu Wunsch-Rolshoven)

Plukis **István Ertl**

## Judaj historietoj

### La dua haringo

Moŝe la tajloro sendis sian junan helpanton Josel al la fiŝvendejo por aĉeti du haringojn. La junulo aĉetis ilin, sed ĉar survoje al la tajlorejo kaptis lin forta, neeltenebla apetito, li formangis unu fiŝon.

— Kie estas la dua fiŝo? — demandis la tajloro.

— Tiu ĉi estas la dua, — respondis Josel.

El la kolekto de **Josef Ŝemer**



## Perantoj de “La Ondo de Esperanto”

**Argentino:** Roberto Sartor, Beruti 2792, 3° 9, C 1425, BBF, Buenos Aires

**Aŭstrio:** Leopod Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

**Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

**Belgio:** FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

**Brazilo:** BEL, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-900 Brasília-DF

**Britio:** EAB/Viv O’Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

**Bulgario:** Georgi Mihalkov, “Nadejda” V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia

**Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

**Danlando:** Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

**Estonio:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

**Finnlando:** EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

**Francio:** Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

**Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

**Hispanio:** Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

**Hungario:** HEA, Pf. 193, HU-1368 Budapest  
KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

**Irlando:** Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

**Islando:** IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

**Italio:** IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano  
Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

**Japanio:** JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tôkyô-to, 162-0042

**Katalunio:** KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

**Koreio:** KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703

**Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

**Kroatio kaj Slovenio:** Višnja Branković (vd. Italio)

**Latvio:** Margarita Želve, Râpniecšbas 35-13, LV-1045 Ršga

**Litovio:** LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

**Nederlando:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

**Norvegio:** Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

**Nov-Zelando:** G.David Dewar, 24 Date Crescent, Halswell, Christchurch, NZ-8025

**Pollando:** PEA, Aleja Wolności 37F/7, 33-300 Nowy Sącz

**Portugallio:** PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

**Ruslando:** Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

**Serbio:** Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

**Slovakio:** Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

**Sud-Afriko:** Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

**Svedio:** Lisbet Andréasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby

**Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

**Usono:** ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530



**Moskvo.** La Lingva Festivalo (pĝ. 14) iĝas unu el ĉefaj esperantistaj eventoj en la ĉefurbo de Ruslando. La prezentantoj kaj la partoprenantoj en la tria festivalo, okazinta la 26an de oktobro en la Fremdlingva Instituto, estis junaj kaj aktivaj. Multaj el ili jam parolas Esperanton. (*Maksim Grišin*)



**Foshan.** En la Esperanto-kurso ĉe la Altlernejo pri Porprofesiaj kaj Teknikaj Studoj en Foshan (Ĉinio) oni praktikas Esperanton babilante rete kun alilandanoj (pĝ. 8). Post unu el la retbabiladoj la kursanoj okazigis foto-sesion, en kiu partoprenis ankaŭ konata esperantisto Ĉielismo. (*Augusto Casquero*)



**ZEO.** *L'Espéranto:* en tiu urbocentra restoracio de Luksemburgo (12-14, rue de Strasbourg) “Tania, Garen kaj Jeannot proponas, krom tradiciajn pladojn, hispanajn specialaĵojn, tortiljojn kaj ĉevalstekon”. Profitos tion la lokaj esperantistoj, kiuj tie Zamenhof-vespermanĝos 16 dec. (Brian Moon / István Ertl)






Jorge Luis Borges. *La sekreta miraklo*  
 Serio Mondliteraturo, Volumo 16  
 200 paĝoj, 18 eŭroj



Jules Verne. *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj*  
 Serio Mondliteraturo, Volumo 15  
 208 paĝoj, 20 eŭroj



J.R.R. Tolkien. *La hobito, aŭ tien kaj reen*  
 Serio Mondliteraturo, Volumo 9  
 224 paĝoj, 18 eŭroj



Georges Simenon. *La flava hundo.*  
 Serio Mondliteraturo, Volumo 14  
 120 paĝoj, 12 eŭroj.